der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

21. Jahrgang | Nr. 134 (6/1985) | ISSN 001 4-0619 | 30 Pf

De la 10-a Ĝenerala Konferenco de MEM:

Rezolucio

La 10-a Ĝenerala Konferenco de MEM, okazinta la 6-an de aŭgusto 1985 en Augsburgo (FRG), traktinte la faritan laboron kaj agadon de MEM, aprobas la multajn atingitajn rezultojn dum la pasintoj jaroj.
La partoprenantoj unuanime akceptas la „Agadprogramon de MEM" por la venonta periodo kaj kun granda bedaŭro konstatas, ke novaj militaj konfliktoj, minacoj, eĉ nuklea katastrofo endanĝerigas la pacon en la tuta mondo. Pro tio ili ege deziras la kunigon kaj plifortigon de la agado de ĉiuj pacamantoj.
Laŭ la spertoj de la partoprenantoj kaj ricevitaj informoj, la konferenco konstatas: la esperantistoj de la plej malsamaj mondkonceptoj, politikaj aspektoj kaj relegioj sentas la neceson pli konkrete kunlabori por la paco. La partoprenantoj konsente akceptas la laborplanon por la „Jaro de Paco" de UEA kaj alvokas ĉiujn esperantistojn prepari la 100-jaran jubileon de Esperanto fidele al la profunda pacidealo de la kreinto de la Internacia Lingvo; la esperantistoj agu, ke la esperantistaro kaj la tuta homaro en paco solenu tiun grandsignifan jubileon.
La konferencanoj manifestas sian volon: vivi en paca mondo kaj kontribui al la interkompreniĝo inter popoloj.
La 10-a MEM konferenco konstatas:
La ekzistantaj, regionaj konfliktoj mortigas milojn kaj milojn da viroj, virinoj, maljunuloj kaj infanoj kaj ruinigas regionojn kaj landojn.
La vetarmado nepre kondukas al tutmonda milita katastrofo, kiu povus transformi la planedon en dezerton, se la popoloj ne leviĝus amase kontraŭ tiu frenezaĵo.
Eĉ sen milito, la vetarmado ruinigas la ekonomiajn eblecojn, do ankaŭ la popolojn, akcelas la elĉerpadon de la naturaj riĉfontoj kaj la ŝanceladon de la fragila ekologia ekvilibro.
En tiuj kondiĉoj, la mizero de la Tria Mondo povas nur profundiĝi.
Sekve de tio la pacamaj esperantistoj deklaras, ke ili subtenas ĉiujn seriozajn, konkretajn kaj realismajn iniciatojn, de kie ajn ili venas, celantajn haltigi la nuntempan militan vetkuradon.
Kun ĉiuj pacfortoj la esperantistaj pacamantoj — aplikante la komunan lingvon, kiu helpas la interkompreniĝon inter la homoj, popoloj kaj landoj — klopodas savi la pacon, ĉar ili volas vivi en paco!

En 2 000-jara urbo: Tago de paco

La 70a Universala Kongreso, de la 3a ĝis 8a de aŭgusto 1985 en Aŭgsburg, Federacia Respubliko Germanio, allogis 2 311 kongresanojn el 50 landoj. El GDR partoprenis la prezidanto kaj la sekretario de GDREA, Hans Heinel kaj Detlev Blanke, krom tio pluaj GDR-anoj.

Aŭgsburg, kiu ĉi-jare festis sian 2 000-jaran ekzistan, per diversaj porpacaj aranĝoj kreis favoran etoson, por sukcesigi la 70an, kiu ja okazis precize 40 jarojn post la militfino.

Jam antaŭ la kongreso okazis grava aranĝo, nome seminario pri informado, kiun gvidis UEA-estrarano Yosimi Umeda. Oni konstatis la urĝan gravecon trejni taŭgajn aktivulojn pri informado entute pripensante la nun ĉirilatan situacion kun la celo plibonigi ĝin. (Ĉi-loke ni atentigas pri nia artikola serio „Informado kaj argumentado" en „der esperantist" n-roj 102 — 110).

La kadra temo de la kongreso „Antikvo kaj moderno: kion ŝanĝi, kion konservi?" estis treege interesa kaj grava sed certe malfacile traktebla dum bolanta kongreso, kie almenaŭ la plej ŝarĝitaj funkciuloj seninterrompe hastas de unu kunveno al alia kiel ekz. la du GDR-reprezentantoj.

Sub gvido de William Auld per diversaj prelegoj oni klopodis tuŝi plej diversajn aspektojn de la temo, teknikajn, ekonomiajn, sociajn kaj esperanto-rilatajn.

Valorus trakti en aparta seminario la kongrestemon strikte ligitan al la nuntempa Esperanto-movado. Ekzemple ankaŭ la 70a Kongreso montris tre klare — i. a. pro ĝiaj altrude sektecaj trajtoj — ke oni ja devus funde pripensi, ĉu daŭrigi tiel ĝis la jaro 2 000 aŭ koncepti pli modernajn kongresojn, do kongresojn en la vera senco de la vorto kaj ilin apartigi de la — ja necesaj — esperantistaj festivaloj. Sed daŭre miksi tiujn du diversajn aferojn oni eble ne tro longe permesu al si. Por ekzameni ĝuste tiun aspekton de „antikvo kaj moderno" la Komitato de UEA fondis apartan komisionon.

La inaŭguro estis tradicia, sed malpli bone improvizita ol dum antaŭaj kongresoj. La flagoj estis elektitaj nur por buntigi la kongresejon, ne por eventuale montri la partoprenantajn landojn. Diplomatoj ne abundis, ĉar Bonn malproksimas geografie de Aŭgsburg. Grava estis la elpaŝo de la ĉina ambasadoro Guo Fenmin, kiu i. a. diris „Pro tio, ke la ĉina registaro simpatias al Esperanto, Ĉinio sukcesis esti la gastiganto de la 71a Universala Kongreso de Esperanto ... Ĉinio ludas pli kaj pli gravan rolon sur la internacia tereno kaj havas pli oftajn kontaktojn kun diversaj landoj. Tial ne nur la ĉina popolo bezonas pli bone koni la mondon, sed ankaŭ popoloj de diversaj landoj bezonas koni Ĉinion. La okazigo de la Universala Kongreso en tiu situacio sendube havos tre gravan signifon".

Dum sia festparolado la vicprezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin emfazis la neceson engaĝi sin kiel esperantisto por paca, senarmila mondo. Li diris i. a.:

„La sumoj investitaj je armiloj ... estas en la plej bona okazo sumoj forĵetitaj: se la armiloj ne estas uzataj ... Rigardu vian najbaron. Estas bona ebleco, ke vi per viaj impostoj kaj via laboro kontribuas ĉiujare pli grandan sumon por detrui tiun najbaron, ol vi elspezis por veni al tiu ĉi kongreso. Kaj same estas bona ebleco, ke via najbaro elspezas pli da mono por detrui vin, ol por komunikiĝi kun vi.

Ĉi tie ne temas pri dekstra politiko aŭ maldekstra politiko, pri la misfaroj de unu lando aŭ alia, sed pri tio ke ni ĉiuj — do la tuta homaro — misuzas la riĉaĵon de nia tero por semi malamikecon, kie devus esti amikeco, morton, kie devus esti vivo, malakordojn, kie devus esti kunlaboro.

Ĉu vere, tiu idealo menciita en la himno de Zamenhof, ke la popoloj faru en konsento harmonian rondon, estas

vere neatingebla? Ĉu vanas nia ideo-lo? Tio ne povas esti. Interkompreniĝo nepre pli bonas ol interbatalado, kaj tiu ĉi bela kongreso estas nepre pli pozitiva kontribuo al la progresigo de la homaro, ol armila konkurenco kaj reciproka akuzado ...

Ke Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko kaj la aliaj instancoj foje montriĝas senpotencaj aŭ foje ne sukcesas alfronti la plej malfacilajn demandojn, tion ni ankaŭ bone scias. Ni kompreneble bone scias, ke ili ne solvis sian propran lingvan problemon, nek traktis adekvate la problemon de lingva egaleco kaj lingva diskriminacio. Tamen, ni devas agnoski — kaj indas agnoski en tiu ĉi periodo en ĝia historio, kiam Unuiĝintaj Nacioj estas pridubata kaj atakata — ke ĝi estas unu el niaj plej grandaj garantioj de paco. Ke por solvi internaciajn problemojn, oni turnos sin unue al vortoj anstataŭ fortoj, kaj al debato anstataŭ disbato. Kvardek jarojn post fondiĝo ni do salutas Unuiĝintajn Naciojn kaj agnoskas ĝin kiel fratan kaj fratinan organizon en la serĉado de internacia kompreniĝo kaj internacia paco".

Kvankam oni ja povus diverse komenti tiun elpaŝon, se ĝi servas al pli forta konsciiĝo de porpaca engaĝiĝo de la Esperanto-movado, tiam ĝi estas tute kongrua tun la nuntempaj vastaj gamoj de la monda pacmovado. Pro tio oni ne povas konsenti kun la prezidanto de UEA, kiu en alia parolado esprimis, ke nur la esperantistoj estas la veraj pacamantoj, ĉar aliaj pacmovadoj nur svingas la flagon de la paco. Mi opinias, ke gvidaj funkciuloj de UEA ne rajtas senkreditigi aliajn pacmovadojn (eĉ se ili ne tuj akceptas Esperanton kiel plej bonan solvon de la lingva problemo). UEA devus rigardi aliajn pacmovadojn kiel aliancanojn, al kiuj UEA donos sian originalan, nemalhaveblan kunlaboran komponenton.

La inaŭguro prezentis ankaŭ missonon, se ne mispaŝon. Aperis sur la podio, laŭ propra prezento, iu profesoro (ĉu aĉetita titolo?) Walter Heubl, kiu estas „ĝenerala konsulo de Burkina Faso" (ĉu vera aŭ aĉetita titolo?) kaj — finfine plej multe parolis kiel prezidanto de la ekssoldata ligo de Bavario. Por ankoraŭ pli buntigi la fenomenan

Dum la 8-a Esperantologia Konferenco: Prelegas d-ro sc. Detlev Blanke, sidanta: la viczrezidanto de UEA, prof. d-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de la State University College Potsdam (Novjorko).

prezenton li ankaŭ salutis en la nomo de iu scienca (ĉu?) institucio de ... Francio. Ŝarlatanaĵoj· La malfermo estis tradicia kaj — parte katastrofa, Kompreneble estas bela tradicio, ke la landaj reprezentantoj salutu la kongreson. Sed estus ankaŭ bele, se ili dirus ion senchavan. Ĉe multaj tio absolute mankis. Iu eĉ ne kapablis flue paroli. Nur bone, ke la gajnenda ekstera mondo ne vidis tiun spektaklon. La prezidanto de GDREA, Hans Heinel, sendube apartenis al la malmultaj esceptoj kaj estis la sola, kiu aludis al la granda verkisto Bert Brecht, kiu naskiĝis en Aŭgsburg kaj skribis la avertajn vortojn pri tiu Kartago, kiu post la tria milito ne plu estis trovebla. Heinel substrekis la respondecon de la esperantistoj kunhelpi, ke nia mondo ne malaperu post la tria milito, sed ke ĝi floru, ĉar nur tiam ne nur la homaro sed ankaŭ Esperanto havas perspektivon ... Kortuŝa momento estis, kiam la prezidanto de la Akademio de Esperanto, d-ro Albault, transdonis al la multmerita profesoro Gaston Waringhien la libron „Li kaj ni" kolektiva verko omaĝe al la 80-jariĝo de Waringhien, editorita de Reinhard Haupenthal.

En la nuntempo, kiam USONO kaj Granda Britio, sed ankaŭ fortoj en aliaj ŝtatoj peze kontraŭpafas UNESKO-n, estas pozitive noti, ke UEA ne partoprenas tiun militiron sed subtenas UNESKO-n. Tion oni i.a. esprimis en la kongresa rezolucio. La Ĝenerala Direktoro de UNESKO, Amadou-Mahtar M'Bow sendis telegramon al la kongreso.

Same bonvena estis la telegramo de UEA al la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo okaze de la dekjariĝo de ĝia okaziĝo. Entute la aŭgsburga kongreso ne tiom elstaris pro sia kongresa temo sed pro la fakto, ke la temo paco estis traktita tre varie, interese kaj pensveke. Al tio kontribuis la surscenigo far Bulgara Esperanto-Teatro de „La aŭgsburga kretocirklo" de Brecht (laŭ ideo, kiun Brecht poste prilaboris en „La kaŭkaza kretocirklo"). La teatraĵo apartenis al la tre sukcesa „Tago de pcao", kiu apartenis al la oficiala kongresprogramo. Parto de tiu Tago estis la bonege preparita kaj gvidita de japanoj kunveno omaĝe al la 40a datreveno de la ĵeto far USONO de atombomboj sur Hirošimo kaj Nagasaki, kiun partoprenis aŭskulte kaj diskute multaj kongresanoj. Dum tiu kunveno Detlev Blanke i. a. atentigis pri la multaj viktimoj de la nazia teroro, pri kiu oni aperigis en GDR en Esperanto du broŝurojn (pri la koncentrejoj Buchenwald kaj Sachsenhausen). Ankaŭ la publika MEM-kunveno estis sukcesa. Post tre longa kaj tro formala enkonduko sekvis vigla diskuto, kiun ankaŭ partoprenis la prezidanto de GDREA, Hans Heinel, substrekante, ke li ne vidas kaŭzon protesti kontraŭ sia registaro, ĉar ĝi faras tian politikon porpacan, kiun li kiel aliaj GDR-civitanoj akceptis. La tuta etoso kaj de la kunveno kadre de la Tago de la paco kaj la publika MEM-kunveno havis tiun spiriton, kiun necesigas la nuntempa tre diversprofila internacia pacmovado.

La Komitato de UEA, al kiu apartenas Hans Heinel (komitatano A) kaj Detlev Blanke (komitatano C), multege kunsidis, entute plenkunside dum 17 horoj kaj komisione certe ankoraŭ 10 horojn. Do por turismi kaj kongresumi, almenaŭ por komitatanoj, ne restis multe da tempo. La komitataj kunsidoj evidentiĝis, ke UEA devas tre pensi por venki financajn problemojn. Bedaŭrinda decido estis la likvido de la oficejo por scienc-teknikaj eldonaĵoj en Budapest (SEC = Scienc-Eldona Centro de UEA). Tion oni faris ĝuste dum tiu momento, kiam — post ja certe tro longa lama laboro — la oficejo komencis serioze produkti eldonaĵojn· Kiaj ajn estas la kaŭzoj, la decido sendube estis malĝusta. Almenaŭ rilate terminologiajn problemojn oni rezoluciis pozitive prepare al kreo de Esperanta Termino-normiga Instituto por la jaro 1987. Fondiĝis komisiono esploronta la eblecojn modernigi la kongresojn. Novaj kunlaborantaj asocioj en UEA akceptiĝis la Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto (kategorio neneŭtrala) kaj Filozofia Asocio Tutmonda.

La kongresa kulturprogramo estis riĉa. Apartenis al ĝi krom la Brechtteatraĵo

ankaŭ la surscenigo de „Tri viroj en neĝo" de Erich Kästner, ankaŭ fare de la bonege ludinta Bulgara Esperanto-Teatro. Ne mankis nacia (germana), muzika kaj internacia arta vesperoj. Krome ne mankis pupteatro („la edziniĝo de la musino"), kabaredo de S. Maul („La pinto"), junulara vespero, kongresa balo, akcepto ĉe la ĉefurbestro kaj diversaj klerigaj programeroj. El la fakaj kaj fakaplikaj vidpunktoj gravaj programpartoj estis „La Tago de la Lernejo", la 8a Esperantologia Konferenco kaj la Internacia Kongresa Universitato. La Tago de la Lernejo traktis la temon „Kiel plivastigi la instruadon de Esperanto?" Oni prezentis referaĵojn kaj modellecionojn.

Dum la 8a Esperantologia Konferenco, kiun gvidis d-roj Tonkin kaj Blanke, estis prezentitaj jenaj prelegoj: d-ro sc. Detlev Blanke (GDR) „Kio estas ‚planlingvo' — terminologia kontribuo", d-ro Werner Bormann (FRG) „Esperanto-kulturo kaj fremdaj vortoj", inĝ. Felix Garcia Blazquez (Venezuelo): „Transitiveco de la verbo aŭ transitiveco de la ago", doc. d-ro Istvan Szerdahelyi (Hungario): „La plej novaj rezultoj de la analizo de Universala Vortaro de Zamenhof", d-ro Klaus Schubert (FRG), „Aktuala stato de la projekto Distribuita Lingva Tradukado (DLT), d-ro Viktor Sadler (Britio) „Cele al sistema prepoziciaro".

Dum la 33a sesio de la Internacia Kongresa Universitato, sub la rektoreco de prof. d-ro Helmar Frank (FRG) oni prezentis jenajn prelegojn: doc. d-ro Heiner Eichner (Univ. Regensburg, FRG) „La lingvaj fontoj de Esperanto"; Rudi Hauger (Teknika Altlernejo Zürich, Svisio) „De incenso antikva al moderna parfumo"; Ye Junijan (Universitatoj Fudan kaj Furen, Ĉinio) „Hans Andersen en Ĉinio"; doc. d-ro Istvan Szerdahelyi (Universitato Budapest) „Aplika lingvistiko: difinoj kaj difino"; mgr. Tibor Sekelj (Jugoslavio) „Projekto por novstila Esperanto-muzeo"; prof. d-ro Humphrey Tonkin (prezidanto de universitato Potsdam ĉe Novjorko, Usono) „Antikvo kaj moderno en la literaturo"; mgr. Margarete Landmark (Centra Instituto por Cerebra Parezo, Oslo Norvegio) „Evoluo de lingvo ĉe infanoj"; d-ro Amri Wandel (Univ. Maryland, Usono) „Astronomio: „Jen nia universo!"; d-ro habil. Rudolf Fischer (Univ. Münster, FRG) „Metodoj eltrovi ŝirmantajn datumojn el statistika datumbanko". Estis krome anoncita en la kongresa libro prelego de prof. d-ro Magomet Isaev de la Sovetia Akademio de Sciencoj. Ĉar ne informinte la kongresan universitaton pri neveno, plenplena salono vane atendis la preleganton. Anstataŭ li poste gvidis forumon pri dulingveco d-ro Hans-Michael Maitzen el Aŭstrio.

Valoras ankoraŭ mencii multajn aranĝojn kaj aspektojn de tiu tute sukcesa kaj multflanka kongreso. Oni ne forgesu la profesie redaktitan (Stefan Maul) kongresan kurieron „La strobilo", kiu aperis per 6 eldonoj.

La gazetaro de GDR (i. a. „Neues Deutschland" la 5an de aŭgusto) informis pri la kongreso. La 71-a UK 1986 okazos en Pekino/Ĉinio.

Detlev Blanke

KONGRESA REZOLUCIO

Por paco kun egaleco

Universala Esperanto-Asocio, dum sia 70a Universala Kongreso, kunveninta en Aŭgsburgo, Federacia Respubliko Germanio, de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto 1985 kun 2 311 partoprenantoj el 50 landoj,

traktinte pri la fundamentaj problemoj, kiujn nuntempe frontas internacia rilatado, kaj pri la problemoj, kiuj estas nuntempe komunaj por la homaro trans naciaj limoj,

notinte la iniciatojn kaj la atingojn okaze de Internacia Junulara Jaro,

konsiderinte, ke la jaro 1985 markas la 40an datrevenon de la fino de la Dua Mondmilito kaj de la fondo de Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj,

deklaras

1. ke la agado komenciĝinta en la jaro 1985 subtene al la junularo estas daŭriginda kaj ke ĝi certe estos daŭrigata en la Esperanta komunumo;

2. ke la klopodoj protekti la naturan medion bezonas translimajn kunordigadon kaj kunlaboron de medioprotektantoj, al kio Esperanto povas kontribui, kaj tial atentigas la koncernatajn asociojn kaj homojn utiligi Esperanton;

3. ke la klopodoj antaŭenigi internaciajn rilatojn en spirito de paco kaj egaleco kongruas kun la idealoj kaj kun la praktika agado de la Esperanto komunumo.

En ĉi tiu senco la agado de Unuiĝintaj Nacioj kaj de ĝiaj fakaj instancoj — unuavice Unesko — estas subteninda kaj subtenota ankaŭ en la estonteco fare de ĉiuj, kiuj, same kiel la esperantistoj, celas pli justajn rilatojn inter la homoj sen distingo pri la sociaj kaj politikaj sistemoj aŭ pri la forto de la unuopaj landoj.
La Internacia Lingvo Esperanto estas rigardenda kiel unu el la elementoj de tiu celado.
4. ke la rajto je paco estas unu el la fundamentaj homaj rajtoj, kiun oni ne pretervidu. Pro tio la ĉiu flanka haltigo de pormilitaj preparoj estas urĝa tasko kaj nepra paŝo sur la vojo al paco kaj por evito de tutmonda katastrofo.
Ĉar la strebo al paco estas nemalhavebla elemento de la idearo de la movado por la Internacia Lingvo Esperanto — kiel oni plej laste reasertis en ĉi tiu kongreso dum la Tago de la Paco, okazinta en la tago de la datreveno de la eksplodo de la unua atombombo en Hirošimo — la Esperanta komunumo aparte intense agados por realigi la celojn de Internacia Jaro de Paco, deklarita de la Ĝenerala Asemblo de Unuiĝintaj Nacioj por la jaro 1986.

De la ‚Tago de la Paco':

Rezolucio

La manifestacio ‚Tago de la Paco', okazinta kiel oficiala parto de la 70-a Universala Kongreso de Esperanto en Augsburg, la 15-an de aŭgusto 1985, en ĉeesto de 120 esperantistoj el 23 landoj, atentis la raportojn pri porpacaj laboroj de esperantistoj en diversaj landoj kaj, memorigante al si la 40-jaran datrevenon post la fino de la dua mondomilito kaj de la eksplodigo de la atombomboj super la urboj Hirošima kaj Nagasaki, diskutis kiel evoluigi pli efike la strebadon por atingi la komunan celon, ke la popoloj en la tuta mondo ne spertu eĉ pli grandan mondopereigan katastrofon, kaj tial

1. proponas al la Estraro de Universala Esperanto-Asocio, ke la ‚Tago de la Paco' estu konstanta parto de la oficiala programo de la estontaj Universalaj Kongresoj,
2. alvokas al esperantistoj tra la tuta mondo fronti verajn vivproblemojn komunajn por la homaro, en la vera senco de la neŭtraleco, kunlaboro kun samcelaj movadoj por preventi ĉiuspecajn militojn sur la terglobo,
3. proponas al la Landaj Asocioj kaj Fakaj Organizaĵoj de Universala Esperanto-Asocio, ke ili enkadrigu porpacajn programojn en siajn laborplanojn, kaj
4. subtenas la strebadon de Unuiĝintaj Nacioj en la lastaj 40 jaroj, forte dezirante ke ĝi plifaciligu la dialogojn inter ŝtatoj diverssistemaj.

En la nomo de la portoprenantoj subskribas: Yosimi Umeda (Japanio), gvidanto de la manifestacio; Kazuko Kikusima (Japanio), kunordigantino; Detlev Blanke, (GDR), reprezentanto de la raportantoj; Michele Lizari-Salto (Italio), protokolantino.
(La Komitato de UEA akceptis tiun-ĉi rezolucion kun 3 kontraŭaj voĉoj kaj 1 sindeteno)

Telegramo

Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo

„Universala Esperanto-Asocio, kunvenante en Aŭgsburgo, sendas siajn salutojn al la finna registaro kaj al aliaj subskribintoj de la Fina Akto de Helsinko okaze de ties deka datreveno. La Fina Akto reprezentis signifan paŝon antaŭen en la internacia kunlaboro. En tiu senco ĝiaj celoj koincidas kun tiuj de la Esperanto-movado, kiu instigas kaj faciligas la kompreniĝon trans landaj kaj lingvaj limoj. Ni esperas, ke tia kompreniĝo vaste pliboniĝos en estontaj jaroj, ĉar ĝi konsistigas la plej bonan fundamenton de daŭra internacia paco."
La 31an de julio 1985

Grégoire Maertens
Prezidanto de UEA

TRADUK-KONKURSO 1986

Ankaŭ en tiu ĉi jaro ni aranĝas „traduk-konkurson" por ĉiuj, kiuj emas tradukadi kaj tiamaniere pruvi siajn konojn pri Esperanto. Sed ĉi-jare okazas la konkurso alie ol dum la pasintaj.

Kondiĉoj:

— traduku laŭ via elekto rakonton aŭ fragmenton de romano, novelo aŭ rakonto — de GDR-aŭtoro;
— amplekso: 2—8 paĝoj (1 paĝo = 30 linioj po 60 tajperoj);
— viaj tradukoj estu maŝinskribitaj sur formato A4 en kvar ekzempleroj;
— indiku kiel eble plej precize la fonton (titolo, aŭtoro, eldonejo, jaro de eldono, ktp.);
— sendu ĉion al: Dieter Berndt, 1020 Berlin, Berolinastraße 2;
— findato: 30. 9. 1986;
— partopreni povas unuopuloj kaj kolektivoj;
— ne rajtas partopreni membroj de la Centra Estraro de GDREA kaj ĵurianoj;
— vi povas partopreni ankaŭ per pluraj tradukaĵoj;
— la redakcio rajtas publikigi viajn tradukojn;
— oni distingos la plej bonajn.

La konkurso estas anonima, tial subskribu viajn tradukaĵojn per kaŝnomo. Aldonu fermitan koverton sur kiu troviĝu la kaŝnomo. En la koverto estu viaj ĝusta nomo kaj adreso.

Kaj nun ek al la tradukado!

Telegramo de Unesko

„En la momento kiam, sub la titolo „Antikvo kaj moderno", vi dediĉas viajn laborojn al tiu malfacila ekvilibro inter la prava respekto al la pasintaĵoj kaj la neprokrastebla bezono pri evoluo, mi volas bondeziri al via 70a Kongreso la plej grandan sukceson. La agado de via Asocio pritraktis samtempe la kreadon de originalaj verkoj kaj la disvastigon — dank' al la tradukado — de la tutmondaj literaturaj ĉefverkoj. Ĝi do senĉese troviĝas antaŭ delikataj elektoj; kiel pridecidi „kion ŝanĝi, kion konservi?" La estetikaj kriterioj ŝanĝiĝas; la relativa graveco de la eventoj estas taksata malsame laŭ la epokoj kaj regionoj. La eblecoj por realigado ne ĉiam atingas la nivelon de la esperoj aŭ de la bezona. La internaciaj organizaĵoj ne povas proponi universalan elektokriterion, sed ili devas laŭeble provi kapti intereson de la publiko, instigi al konsciiĝo pri la graveco de la demando. Siaflanke, Unesko laboras por diskonigi kaj aprezi la grandajn atingojn de la pasinteco, inventari kaj kuraĝigi la konservadon de la kulturaj heredaĵoj, ĉu spiritaj, ĉu materiaj, ĉar ili estas la plej evidenta esprimo de la genio de la popoloj, por disvastigi la intelektajn kaj artajn valorojn, cele al reciproka pliriĉiĝo, por pluinstigi la kreivon kaj evoluon. Ĝiaj ŝtatoj-membroj tiamaniere disponas pri elementoj nemalhaveblaj por alpreni decidojn. Unesko tiele volas ja plue instigi la agadon de Asocio kiel la via, kiu favoras la reciprokan konatiĝon de la malsamaj popoloj kaj laboras por pli bona internacia kompreniĝo."

Amadou-Mahtar M'Bow
Ĝenerala Direktoro

6a ekumena kongreso 1985 en Augsburg

Unu semajno antaŭ la Universala Kongreso de Esperanto okazis la sesa ekumena kongreso 1985 en Aŭgsburgo. De la 27a de julio ĝis la 3a de aŭgusto 1985 renkontiĝis 143 kristanoj el 20 landoj. Ĉeestis partoprenantoj el Svedujo, Norvegio, Irlando, Skotlando, Anglio, Francujo, Belgio, Nederlando, FRG, Italujo, Svislando, Aŭstrio, GDR, Pollando, Hungario, Jugoslavio, Bulgario, Rumanio, Usono kaj Japanio. Precipe ĉeestis anoj de KELI (evangelia) kaj de IKUE (katolika), gvidataj de la prezidantoj de KELI kaj IKUE, pastoro Burkhardt kaj pastro Eichkorn.

La kongresanoj kune laboris. Ili aŭskultis prelegojn, preĝis, ĉantis kaj interparolis fake kaj teologie.

Prelegoj pri kristanaj problemoj inter la konfesioj estis traktitaj, ekzemple: La dekreto pri la ekumenismo de la 2a Vatikana Koncilio; La Aŭgsburga Konfesio kaj la „Malgranda Katekismo de Luther"; la psalmoj — preĝo de la homaro; La ekumena traduko de la Biblio; La Biblio en nia vivo k. t. p.

Dum ekumena diverso predikis pastoro Hans-Jürg Kelpin el Greußen/GDR pri teksto el Apokalipso de Johano 21, 1—7.

Interalie estis prezentitaj „La Pacludo" de Bengson, „La Aŭgsburga Kretocirklo" laŭ la antaŭskizo de Bertolt Brecht, kiu naskiĝis en Aŭgsburgo, kaj bavaria folklora vespero.

Okazis ekskurso al la iama koncentrejo Dachau apud München, kie la faŝistoj mortigis multnombrajn diverslandajn homojn, kristanojn kaj komunistojn.

La vizito de la prezidanto de UEA, Grégoire Maertens, en la ekumena kongreso kaj liaj salutvortoj signifis altan estimon al la kongreso.

Dum la kunveno estis konfirmitaj la estraroj de KELI kaj de IKUE kaj estis formita laborgrupo por la venontjara jubileo „75jara KELI" kaj por 1987 „Centjara jubileo de Esperanto", en kiu interalie ankaŭ estis nomumita la partoprenanto el GDR, pastoro Hans-Jürg Kelpin.

La ekumena ideo kunligis la homojn diverskredajn al unu celo, al interkompreniĝo. La plej multaj ĉeestintoj ankaŭ partoprenis la 70an Universalan Kongreson en Aŭgsburgo.

Hans-Jürg Kelpin

Internacia Medicina Esperantista Konferenco '85

La mallongigo IMEK jam fariĝis konata en la Esperanta fakaplika mondo. 1977 en Krakovo / Pollando okazis IMEK I, 1979 en Hodmezövasarhelyi/ Hungario la IIa, 1981 en Ruse/Bulgario la IIIa, la IVa 1983 en Poprad/ČSSR kaj fine 1985 en GDR la Va konfereno de ĉi-tiu serio. IMEK V okazis de la 8a ĝis 14a de septembro en la 825jara nordgermana urbo Schwerin (Ŝverin), kiu situas en bela lagoriĉa arbara regiono de GDR. Oni ne elektis Schwerin pro eventuala multeco da medicinistaj esperantistoj, kvankam kelkaj malmultaj ja ekzistas. La ĉefa kaŭzo estis la nuna nova kvalito de la Distrikta Estraro de GDREA tie laboranta trankvile kaj celkonscie sub la gvido de Kurt Güse kaj Franz-Peter Kurtz kaj la bonegaj personaj kaj teknikaj kondiĉoj, kiujn disponigis la Distrikta Estraro de Kulturligo mem.

La programo

La programo sendube estis riĉa kaj varia. Ŝverinanoj, aparte **Ursula Doehler** kaj ankaŭ **Margret Musewald** de la Distrikta Estraro de Kulturligo kaj **Kurt Güse** kaj **Franz-Peter Kurtz** de la Distrikta Estraro de GDREA dum longa prepara periodo kreis la necesajn kondiĉojn. Por la faka preparo zorgis **d-ro Giso Brosche,** la prezidanto de la Medicinista Fakrondo de GDREA. Por la organizantoj la konferenco jam komenciĝis ĵaŭde, la 5an de septembro per gazetara konferenco, kiu estis tre sukcesa. Dimanĉe la alveturantoj tuj trovis antaŭ la stacidomo grandan IMEK-informtabulon en germana lingvo kun la IMEK-emblemo, kreitan de Rudolf Hahlbohm.

La tuta konferenco okazis en la domo de Kulturligo, bele situita ĉe Pfaffenteich („pastreta lago", meze en Schwerin). La inaŭguron partoprenis kiel reprezentantoj **prof. d-ro Karl-Ernst Sommerfeld**, en GDR fama lingvisto, prezidanto de la Distrikta Estraro de Kulturligo, membro de la Prezidia Konsilantaro. Oni povis saluti la gvidanton de la distrikta sanitara servo, **supra medicina konsilisto d-ro Arno Trszeczak,** membro de la Distrikta Komunuma Konsilantaro. En la prezidio plue sidis la prezidanto de Universala Medicina Esperanto-Asocio, **d-ro Imre Ferenczy** (Hungario), **d-rino Maria Lukanova** (Bulgario), **d-ro Josef Hradil** (por la ĉeĥaj medicinistoj) kaj **d-ro Josef Grenda** (por la slovakaj medicinistoj). La reprezentantoj de GDR estis **d-ro Giso Brosche, d-ro sc. Detlev Blanke,** la sekretario de GDREA, kaj **inĝ. Kurt Güse**, la prezidanto de la Distrikta Estraro. La hungarajn kuracistojn reprezentis **d-ro Balázs Szemök,** la polajn **d-ro Marian Łaba.** El Soveta Unio la reprezentanto estis **doc. d-ro sc. med. Adomas Vaitilavičius.** Partoprenanto el Svislando estis **s-ro Rudi Hauger.** Post mallonga muzikaĵo **d-ro Giso Brosche** malfermis la konferencon. Sekvis paroladoj kaj salutoj de la menciitaj prezidantoj. Dum la konferenco oni prezentis salutmesaĝon de la estrarano de UEA por faka agado, **Petro Todorov.** La programo kosistis el jenaj partoj: fakprelegoj, fakekskursoj, kulturaj kaj distraj programeroj. Dum la fakprelegoj oni entute prezentis 27 kontribuojn (vidu sube). Dank al la bonega helpo de la estro de la distrikta sanitara servo, **d-ro Arno Trzeczak** (Tŝeĉak) la konferencanoj povis viziti tri sanitarajn entreprenojn: la poliklinikon en Sternberg, la ambulatorion en Brüel (ambaŭ malgrandaj urboj) kaj la tre modernan distriktan malsanulejon en Schwerin, kiu estas ekipita per lastdata komputila tekniko, nukleomedicinaj instalaĵoj k. c. Dum interkona vespero oni povis aŭskulti kanzonojn de la bulgara opera kantisto **Michail Tschergoff** (Ĉergov), sekvis la

prelegoj de **Franz-Peter Kurtz** pri la Esperanto-movado en la distrikto Schwerin kaj de **Joachim Thormann** pri Schwerin kaj la muzeo pri la skulptisto, pentristo kaj verkisto **Ernst Barlach** el Güstrow. La bele restaŭritan urbcentron de Schwerin, la faman kastelon kaj Güstrow, la urbon kun la muzeoj pri la verko de Ernst Barlach, oni vizitis dum ekskursoj, gvidataj tre lerte i. a. de **Joachim Thormann.**

Dum la ekskursa tago, marde, survoje al Güstrow, la partoprenantoj de IMEK V omaĝis al la „Patrino", monumento ĉe la periferio de Schwerin, kiu situas ĉe tiu loko, kie finiĝis pro la antaŭeniro de la sovetia armeo la mortiga marŝado de 30 000 arestitoj el la koncentrejo Sachsenhausen, kiu komenciĝis la 21an de aprilo 1945. Ĉirkaŭ 10 000 arestitoj mortis aŭ estis mortpafitaj survoje. (Pri la koncentrejo Sachsenhausen la konferencanoj povis informiĝi pere de ricevita ilustrita broŝuro en Esperanto.)

Post la ekskurso al Güstrow (i. a. kun vizito de la kastelo kaj preĝejoj kun skulptaĵoj de Ernst Barlach) en Schwerin vespere oni povis ĝui meklenburgan folkloran vesperon (Schwerin troviĝas en la nordgermana regiono „Mecklenburg"). Merkrede vespere la belega lago de Schwerin invitis al boata veturo kaj ĵaŭde vespere okazis la tradicia IMEK-balo, i. a. kun kanzonoj en Esperanto, prezentitaj de la kanzonisto **Klaus Ebert** el Berlin. Ne mankis la regione konata balado pri Fritze Bollmann (Frice Bolman), prezentita de **Elli** kaj **Kurt Güse.** La tutan konferencon finis solena koncerto en la belege restaŭrita tronsalono de la kastelo. Oni prezentis verkojn de Händel, Bach kaj Mozart. La konferencanoj akceptis deklaron (vidu sube).

Al la konferenco apartenis ankaŭ tri ekspozicioj: 1. Fotoserio pri Kubo de **Wolfgang Pätzold** („Naskita sur la insulo de la libereco: la junularo de Kubo"), 2. Filatela objekto pri la IMEK-serio (de **d-ro Giso Brosche)** kaj pri la historio de la laborista Esperanto-movado (de **Rudolf Burmeister),** 3. Ĉirkaŭ 40 koloraj pentraĵoj de infanoj el Bulgario, ĈSSR, Hispanio, Soveta Unio kaj GDR pri la temo „La kuracisto — mia helpanto" (organizita de **d-ro Klaus Bochmann**). Ne mankis librostando, porokaza poŝtstampo en Schwerin (kiu funkciis dum 1 semajno) kaj konferencaktujo, i. a. kun IMEK-kovertoj, GDR-Paco 1984, broŝuroj pri la iamaj koncentrejoj Sachsenhausen kaj Buchenwald, prospektoj pri Schwerin kaj informilo de Internacia Esperanto-Instituto, Nederlando, pri amiotrofia latera sklerozo. La konferencajn fotojn faris **Angelika Binner** el Schwerin.

La partoprenantoj de IMEK V

Entute partoprenis 80 personoj, diversfakaj kuracistoj, anoj de mezaj medicinaj profesioj kaj parencaj okupiĝoj kaj kelkaj esperantistoj el Schwerin. La partoprenantoj venis el Bulgario (16), ĈSSR (6), GDR (22, inkluzive organizantojn), Hungario (18), Pollando (5), Soveta Unio (4) kaj Svisio (1, t. e. FRG-ano loĝanta en Svisio). La antaŭlastan tagon alvenis eĉ islandano. La nombro de 80 personoj restis konsiderinde sub tiu de la aliĝintoj. Bedaŭrinde ankaŭ IMEK V montris tiun trajton de neserioza rilato al organizantoj de aranĝoj, kutima inter esperantistoj. Iuj tute ne anoncis sin kaj subite alveturis, kio kaŭzis subitajn organizajn problemojn. Unu partoprenantino miksis la fakan aranĝon kun turisma dormebleco ne volante pagi la kotizon kaj celis „nur tranokti". Plej malagrabla tamen estis la fakto, ke de 8 bulgaroj, 3 poloj, 4 hungaroj (= 15 personoj!) oni nenion aŭdis, kvankam por ili estis rezervitaj tranoktejoj. Tiujn la organizantoj devis pagi. La elementaj sociaj normoj fakte postulas almenaŭ ĝustatempan malaliĝon, por ke la organizantoj ankoraŭ povu malmendi menditajn servojn. Sed en la „verda mondo" bedaŭrinde la sociaj kutimoj ofte estas tre kontraŭnormaj. Sed kritikon ankaŭ meritas la esperantista medicinistaro.

Tre subevoluinta estis la preteco reagi je invitoj. Sekciestroj de UMEA (Universala Medicina Esperantista Asocio) tute ne reagis je la peto de la faka konferenca gvidanto **d-ro Giso Brosche,** en la kazo de nepartopreno almenaŭ sendi salutmesaĝon al la konferenco. Neniu sendis. Mankis ĉiu ajn reago

Laŭ malnove kutimo en Litovio litovaj IMEK-partoprenantoj transdonas al d-ro Giso Brosche (maldekstre) kaj prof. d-ro Karl-Ernst Sommerfeld honoran skarpon kiel signon de amikeco.

Foto: Angelika Binner

flanke de medicinistoj, kiuj laŭ la jarlibro de UEA kaj laŭ la tre utila libro „Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko" ricevis informilojn. Kaj strange estis, ke el nesocialismaj landoj partoprenis nur du personoj, el kiuj unu (el Svisio) profesie ne estis medicinisto kaj la alia (el Islando) nur alvenis ĵaŭde. Unu franco tro malfrue petis informojn (dum aŭgusto), tiel, ke lia partopreno ne plu eblis. La partopreno el GDR estis nekontentiga, ĉar oni ja rajtus atendi, ke la kolegoj el la propra lando utiligus la eblecon partopreni. Same nekontentiga estis la partopreno el ĈSSR kaj Pollando. Ĉio ĉi starigas kelkajn seriozajn demandojn. Ĉu eventuale la emo al faka apliko de Esperanto estas multe malpli evoluinta ol supozite? Eble la ludemo en la „verda mondo" estas pli forta ol serioza faka agado. Do oni ne venas al seriozaj aranĝoj . . ., kial?

Tre grava kaj pozitiva estis la engaĝita kaj helpopreta partopreno de la prezidanto de UMEA, **d-ro Imre Ferenczy** el Hungario. Sed flanke de UMEA — krom li — neniu reagis, ankaŭ ne el Japanio, kvankam oni ja publikigis en MIR (Medicina Internacia Revuo) la informojn pri IMEK '85. Eble UMEA apenaŭ ekzistas?

Tamen — almenaŭ tiuj, kiuj partoprenis, havis interesan semajnon. La aliaj, kiuj ne partoprenis, mem bedaŭru la perdon.

La prelegoj

La 27 fakprelegoj estis prezentitaj lunde posttagmeze, merkrede antaŭkaj posttagmeze kaj kelkaj ĵaŭde antaŭtagmeze. Preskaŭ ĉiuj kolegoj sekvis la malfacilan instrukcion kaj nur uzis 15 minutojn por la prezento. Sekvis ofte vigla interdisciplina diskuto, certe ne tiom kutima sur nacia nivelo.

Tamen, oni povis konstati, ke aparte diskutigaj estis tiuj prelegoj, kiuj tuŝis ĝenerale, do interdiscipline interesajn temojn. Tro specialaj prelegoj, kvankam ofte altnivelaj, ne ĉiam trovis la intereson. Verŝajne ĝuste la multflankeco de la temoj estis kaj avantaĝo kaj malfacilo. La kadra temo, lige al la internacia jaro de la junularo kaj al la monda santago estis „Sana junularo, tasko, respondeco kaj sindevigo por ĉiuj". 11 prelegoj estis ligitaj al la kadra temo. Aparte menciinda estas la fakto, ke oni ankaŭ prezentis tute novajn ekkonojn, ekzemple **s-ro Opoka** (Pollando) pri la „Apliko de mempreparita alojo por muldi dentoprotezojn", temo la unuan fojon entute antaŭ internacia publiko. Grandan intereson ankaŭ vekis la temo „Ultraviola radioteriapio de propra sango" prezentita en la germana de **d-ro Siegfried Wiesner** kaj tradukita Esperanten de la juna esperantisto **Rainer Birkholz.** Apartan intereson trovis kaj diskuton vekis la prelego „Aktualaj etikaj problemoj de la medicino" de **d-ro Klaus Bochmann.**

Bedaŭrinde ne ĉiuj kolegoj donis al la konferenca gvidanto la kutimajn resumojn.

La faka valoro aparte kuŝas ĝuste en la interdisciplina kontakto, ĉar la medicinistoj ja jam tre mallarĝe specialiĝis kaj ofte simple ne plu povas orientiĝi en la disciplinoj de siaj kolegoj. La grava demando estas, kion fari kun la parte tre valoraj prelegoj de IMEK II, IV kaj V. La prelegoj de IMEK I (Pollando) kaj III (Bulgario) aperis presitaj. Jen la listo de la fakaj prelegoj:

— **Lukanova, Maria (Bulgario): Rilato de la junularo al la sano — pri profilaktiko de la nuntempaj amasaj malsanoj**

— **Bikszádi, Ilona (Hungario): Infansanitara Centro en Miskolc — modelo de preventa kaj kuracada laboro**
— **Bärenz, Irmgard (GDR): La malsanoj de la koksartiko dum la adoleskanteco kaj vidpunktoj de diferenciga diagnozo**
— **Conov, Ljudmil (Bulgario): La cefalalgio en la infanaĝo**
— **Hradil, Josef (ČSSR): Sana junularo — nia plej granda riĉaĵo**
— **Banaitis, Valdas (USSR): Tri nekutimaj aspektoj pri psikoterapio de alkoholismo**
— **Bochmann, Klaus (GDR): Aktualaj etikaj problemoj de la medicino**
— **Łaba, Marian (Pollando): Influo de medikamentoj je la stiristoj kaj la stirado de aŭtomobiloj**
— **Molnár, Lajos (Hungario): Rentgendiagnostiko de kelkaj denaskaj anomalioj de la koro**
— **Volkmann, Margit (GDR): Kion devus scii la paciento, se li iras al diversaj rentgenesploradoj?**
— **Opoka, Włodzimierz (Pollando): Apliko de mempreparita alojo por muldi dentoprotezojn**
— **Stamenova, Cveta (Bulgario): Pri la rolo de la medicinistoj en la bataloj de la bulgara popolo**
— **Čolakova-Bojaĝieva, Paraŝkeva (Bulgario): Influo de hipobara hipoksio sur la aktivecon de enzimoj en la histoj de musoj**
— **Zemlin, Herta (GDR): Diagnostikaj kaj genetikaj problemoj de la progresema sepsa granulomatozo**
— **Gekova-Mladenova, Anka (Bulgario): Rolo kaj loko de kluboj laŭ interesoj en la Centra Kulturdomo de sanlaboristoj**
— **Harna, Vladimir (ČSSR): Desinserto de Achilles-tendeno ĉe junaj virbovoj rapide nutritaj por viando**
— **Ferenczy, Imre (Hungario): La plej oftaj malsanoj de hungaraj fervojistoj**
— **Kanjowska, Emilija (Bulgario): Kampilobakteriaj infektoj en la homa patologio**
— **Bojaĝieva, Penka (Bulgario): Akutaj medikamentaj toksadoj ĉe la infanoj laŭ materialoj de la infankliniko Šumen pri periodo 1974 — 1983j.**
— **Grenda, Stefan (ČSSR): Movaktiveco en la prevento de la civilizaj angiaj malsanoj**
— **Siegfried Wiesner (GDR): Ultraviola radioterapio de propra sango**
— **Kostova, Ludmila (Bulgario): Harditaj infanoj — sana generacio, sana popolo**
— **Berenyi, Karlo (Hungario): Esploro de profilaktika antiastma efiko de medikamento Zoditen ĉe infanaĝo**
— **Berenyi, Karlo (Hungario): Sučinfanaj enteritoj kaŭzitaj de la kampilobakteriaj infektoj**
— **Egry, Boris (Hungario): Spertoj pri la dinamiko de ovulmetado de gosderofilus intestales**
— **Egry, Boris (Hungaroi): Pri la veterinarmedicinaj rilatoj de la homa kampilobakteriozoj**
— **Farago ,Katalin (Hungario): Sanprotektaj metodoj inter infanoj.**

Aparte interesaj ankaŭ estis la prelegoj pri terminologiaj demandoj. La diskuto montris, ke tute ne ĉiuj kolegoj konscias pri la graveco kaj samtempe komplikeco de la temo. Pro tio la temo de **Wera Dehler** „Problemoj de terminologio kaj terminografio en Esperanto" donis bonan superrigardon pri la problemaro.

D-ro Vaitilaviĉius kritike analizis la medicinan terminaron de **d-ro Hradil**. **D-ro Szemök** prezentis problemojn de la stomatologia kaj **d-ro Brosche** pri la veterinara terminologio. Tre interesa prelego, ja ankaŭ iel ligita al terminologiaj problemoj, estis la prezento de la „distribuita lingva tradukado (DLT)" projekto nuntempe esplorate en Nederlando, fare de **Michael Behr**. Kaj **d-ro Blanke** skizis kelkajn problemojn de atingoj kaj — hereze — de mankoj de Esperanto kaj ĝia movado antaŭ la centjariĝo.

Efiko de IMEK

Ne eblas antaŭdiri la efikon de IMEK V en la Esperanto-movado. Ĝi certe restos en la kutimaj limoj. Tamen en GDR ĝi havis tre bonan efikon. La gazetara eĥo estis bonega. Entute aperis 9 artikoloj kaj 2 novaĵagentejaj tekstoj, el kiuj unu aperis ankaŭ en la angla, franca kaj hispana, do evidente transdonitis al la eksterlandaj agentejoj.

Du ampleksaj radiointervjuoj, unu kun **d-ro Brosche**, la alia kun **d-roj Banaitis** (Soveta Unio) kaj **Blanke**. La televida programo de GDR, en la kadro de la novaĵraportoj, menciis la konferencon. Tre efike la konferenco pruvis al diversaj funkciuloj de Kulturligo aŭ de la urbaj instancoj, ne nur la funkciadon de Esperanto sed ankaŭ ĝian fakan taŭgecon. Tio ankaŭ validas por la medicinistoj kaj la sanitara servo der Schwerin. La prezidanto de la distrikta estraro de Kulturligo en Schwerin, fama lingvisto kaj partopreninto de interlingvistika seminario en Ahrenshoop travivis la funkciantan planlingvon. Do la konferencon oni povas juĝi tre utila por GDREA, ĉu ankaŭ por la partoprenintoj, tion juĝu ili mem.

Konkludaj konsideroj

Vendrede posttagmeze okazis la ferma kunsido, kiu havis la taskon pritaksi la konferencon. Almenaŭ tion antaŭvidis la programo. Tio estis por IMEK ŝajne nova kutimo, kvankam ja pure logika. Se oni kun multe da klopodoj organizis fakkonferencon, kiun aktive partoprenis multaj kolegoj, pritakso ja helpas al estonta evito de eraroj kaj helpas al plibonigo. Sed malgraŭ la detala oferto de pritakseblaj aspektoj, flanke de **d-ro Brosche,** la reago de la partoprenintoj estis tre magra. Nur kelkaj esprimis opinion. Tamen el la iomaj diskuto kaj kontribuoj kaj el la spertoj de la organizantoj pripensindas eble jenaj problemoj kaj aspektoj:

1. La medicinistaj esperantistoj devus pli aktive rilati al sia IMEK, varbi por ĝi, aliĝi kaj (ne nur aliĝi) ankaŭ partopreni.
2. La prelegoj estu tiaj, ke ili tuŝu la intereson de multaj diversfakaj medicinistoj kaj provoku al diskuto. Do necesas ne tro specialaj sed problemvekaj interdisciplinaj interesaj temoj.
3. Por levi la enhavan nivelon de la prelegoj, la naciaj sekcioj helpu

Partoprenantoj de IMEK V en la polikliniko de Sternberg, distrikto Schwerin.
Foto: Angelika Binner

al prelegemuloj aŭ, se necese, klare malkonsilu prelegi al nekapablaj.

4. Kelkaj prelegantoj pli forte konsciu, ke ili prelegu ne por si mem, sed por la publiko. Necesas do ne nur enhave sed ankaŭ teknike bone preparitaj prelegoj, prezentitaj akustike en komprenebla maniero. Tio i. a. postulas almenaŭ fortan voĉon kaj elteneblan prononcon.
5. Kolegoj, kiuj partoprenas iun IMEK-aranĝon la unuan fojon, trovus helpon, se la organizantoj disponigus, kvazaŭ resume, la ĉefajn rezultojn kaj spertojn de antaŭaj IMEK-oj. En la dissendata informilo almenaŭ enestu pli da informoj pri la celo, karaktero, specifaĵoj kaj spertoj de tiu konferenca serio.
6. Tre grava estas la traktado de terminologiaj demandoj. Dum IMEK V kaj ankaŭ jam dum aliaj IMEK-oj montriĝis, ke ne ĉiam oni konscias pri la graveco de tiu problemaro.
7. Estus dezirinda la antaŭkolekto kaj multobligo de la prelegoresumoj. Tio helpus pli aktivan pariĝon por la postprelegaj diskutoj.
8. Malferma restas la utiligo de la parte tre interesa prelegomaterialo. Nur de IMEK I (Krakovo), IMEK III (Ruse) ekzistas volumoj kun prelegotekstoj. Estus dezirinde prepari kolekton de elektitaj prelegoj de IMEK II, IV kaj V. Sed kiu eldonos tiun kolekton?
9. Neklara estas la kaŭzoj de manko de intereso flanke de okcidentlandaj esperantistaj medicinistoj. Ili estonte pli multnombre aliĝu al IMEK.
10. Tre utila estos vasta informado pri IMEK ne nur en Esperantaj sed ankaŭ en nacilingvaj periodaĵoj.
11. Neklara ŝajnis la statuso de IMEK. En la jarlibro de UEA oni listigas ankaŭ la IMEK-ojn sub la aktivaĵoj de UMEA. Sed se IMEK estus konferenco de UMEA, UMEA devus multe pli aktive partopreni la preparon. Almenaŭ por IMEK V ĉirilate nenio okazis. Kaj IMEK V sendube ne estis konferenco de UMEA sed de Esperanto-Asocio de GDR, kiu tre bonvenigis la aktivan partoprenon de la UMEA-prezidanto.
12. Eventuale, ĉe pli granda partoprenantaro en estontaj IMEK-oj, ankaŭ eblus labori en pli specialigitaj sekcioj.

Certe, tio nur estas kelkaj el la konsideroj fine de IMEK V. Ni esperu pri fruktodona IMEK VI, eventuale 1987 en Pollando.

debe

ALVOKO

1. Universitataj tezoj

Mi kompiladas informojn pri universitataj tezoj, disertacioj aŭ diplomverkoj, licenciaj aŭ doktoraj, kiuj rilatas al Esperanto, esperantologio, interlingvistiko aŭ la problemaro de la internacia komunikado ĝenerale.
Ankaŭ estas bonvenaj informoj pri diplomverkoj el altlernejoj neuniversitataj, kiuj pritraktas la saman temaron.
Ĝis nun mi kolektis 100titolojn el 25 landoj. UEA eldonos la kompletajn informojn (titolo, aŭtoro, amplekso, universitato, diplomo, resumo de la enhavo ktp.) en broŝuro, verŝajne en la komenco de 1986.

2. Esperanto-instruado: inventaro

La nova estraro de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (I.L.E.I.), sub la prezidanteco de prof. d-ro István Szerdahelyi el Budapeŝto, intencas fari kompletan inventaron pri la nuna situacio de la Esperanto-instruado en la mondo.
Ni serĉas aktivajn kaj fidindajn kunlaborantojn en ĉiuj landoj, kiuj konsentas kolekti informojn pri ĉiuj aspektoj de la Esperanto-instruado: disponeblaj instruistoj kaj instruantoj (nomo, adreso, kapablo), lerniloj (lernolibroj, diskoj, kasedoj, video-bendoj, korespondaj kursoj k. s.), leĝaj aranĝoj, listo de oficialaj kaj ne-oficialaj kursoj je ĉiuj niveloj, formado kaj trejnado de instruantoj, enhavo de la kursoj, ktp.
Antaŭ ol organizi mondvastan kampanjon pri efika informado kaj instruado de Esperanto, ni nepre antaŭe sciu pri kiuj homfortoj kaj rimedoj ni disponas kaj kio jam ekzistas.
Bonvolu sendi eventualajn informojn al

Edward Symoens
Vicprezidanto de ILEI
Putsesteenweg 131/A
B — 2180 Kalmthout (Belgio)

Szerdahelyi: prezidanto de ILEI

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) elektis novan prezidion. Elektiĝis kiel Prezidanto d-ro Istvan Szerdahelyi, docento en la Universitato de Budapest. Vicprezidanto fariĝis Edward Symoens (Belgio), ĝenerala sekretario Catina Dazzini (Italĭo) kaj sekretario Marin Bacev (Bulgario).

Rezolucio de IMEK IV

La partoprenantoj de la V-a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco, okazinta de la 8a ĝis 14a de septembro 1985 en Schwerin/GDR, kun pli ol 80 partoprenantoj el Bulgario, ĈSSR, GDR, Hungario, Islando, Pollando, Soveta Unio kaj Svisio, sub la kadra temo „Sana junularo — tasko, respondeco kaj sindevigo por ĉiuj",
elstarigas la grandan humanisman respondecon de ĉiuj kunlaborantoj de la sanaferaro por la konservo de la vivo kaj sano,
memorigas pri la milionoj da viktimoj kaj la teruraj ruinigoj sekve de la dua mondmilito iniciatita de la germanaj faŝistoj kaj finiĝinta antaŭ 40 jaroj, kaj sekve de la atombomboj ĵetitaj de USONO sur Hirošimon kaj Nagasakon,
esprimas sian fortan maltrankviliĝon pri la aktuala forta minaco de la monda paco per la plej agresemaj imperiismaj rondoj realigantaj politikon de superarmado kaj konfrontado,
substrekas, ke nur sub la kondiĉoj de la paca kunekzistado, malarmado kaj plifortigita samrajta internacia kunlaboro ekzistas la eblecoj kaj rimedoj por garantii la plej elementan homan rajton, la rajton je vivo kaj homdigna ekzistado, kaj ke nur sub tiaj kondiĉoj por milionoj da homoj de nia tero estos eviteblaj pezaj kaj mortigaj malsanoj,
decide kondamnas la preparon de kosma milito, kiu kreus la danĝeron de kompleta likvido de ĉiu vivo per nuklea infero,
alvokas pro tio ĉiujn medicinistojn-esperantistojn, ankoraŭ pli forte ol ĝis nun agadi por malstreĉiĝo, paca kunekzistado kaj malarmado, por mondo sen milito, en kiu plenkreskos sana junularo kaj fariĝos realeco la ĉefa celo de la Monda San-Organizo „Sano por ĉiu ĝis la jaro 2000" kaj
atentigas pri la neceso ellabori planon por estonta pli efika kunlaboro inter medicinistaj esperantistoj petante UMEA-on finpretigi ĝin ĝis la jubilea jaro.

Rezolucio pri terminologio: Esperanta termino-normiga instituto fondota

La Komitato de UEA en Aŭgsburg akceptis jenan rezolucion:

I Konsiderante
— ke la scienc-teknika revolucio stimulas impete la evoluon de la faka lingvo,
— ke por la estonta pozicio de Esperanto en la mondo de fundamenta graveco estas ĝia altkvalita apliko en scienco kaj tekniko,
— ke tiu faklingva apliko de Esperanto en la postulenda kvalito nur eblas, se la terminologio respondas al la necesa nivelo kaj ke diletanteco kaj hazardeco de terminologia laboro grave endanĝerigas tiun kvaliton,

II Proponas al la Komitato, ke oni en la jaro 1987 fondu
Esperantan termino-normigan instituton kun la ĉefaj celoj
a) plibonigi kaj unuecigi la terminologian laboron,
b) reprezenti Esperanton en internaciaj normigaj institucioj (ISO, Infoterm k. s.)

III Proponas al la Komitato, ke ĝi
komisiu la Terminologian Sekcion de UEA (ĝis nun ligitan al la Scienc-Eldona Centro ed UEA de Budapeŝto)
kunlabore kun kompetentaj esperantistaj institucioj (Akademio de Esperanto, ISAE, CED, fakaj asocioj k. s.)
trovi la kompetentajn homojn, prepari la necesajn dokumentojn kaj entrepreni aliajn necesajn paŝojn por ebligi la fondon de tiu Esperanta termino-normiga instituto,

IV Proponas al la Komitato, estabi la „Fondaĵon Wüster" (fondaĵo terminologio) por certigi la necesajn financajn rimedojn por terminologiaj aktivecoj.

Elke Valtin

Moskvo 1985:

La monda junularo renkontiĝis

Al Moskvo ĉijare venis 20 000 delegitoj el 157 landoj kaj Okcidenta Berlino. Gejunuloj, reprezentantaj diversajn politikajn, filozofiajn kaj religiajn ideojn partoprenis abundan programaron sub la kadra temo „Por antiimperialisma solidareco, paco kaj amikeco". Sian komunan, interligantan deziron, la deziron al paco kaj malarmado sur la tero kaj en la universo ili esprimis dum grandegaj manifestacioj okaze de la 40aj datrevenoj de la venko super la faŝismo kaj de la tragedio de Hiroŝimo kaj Nagasaki. Miloj donis sian voĉon por solidareco kun la popoloj batalantaj por siaj liberigo kaj naciaj rajtoj. La komuna simpatio por tiuj popoloj esprimiĝis ne nur dum la inaŭgura solenaĵo. Kelkfoje pli diferencaj estis la opinioj dum diskutoj en la 15 temaj centroj, kies ĉefaj temoj estis ekz. „Junularo en scienco kaj arto", „Internacia jaro de junularo", „Mediprotektado", „Antiimperiisma solidareco", „Por paco kaj malarmado".

Kvankam facile komprenebla, tamen estis domaĝe, ke ĝuste dum la „varmegaj" diskutoj ne ĉiam la (entute ĉ. 3000) tradukistoj kapablis sekvi. Malpli komplika estis la komunikado per kulturo. Buntnacia dancado kaj kantado sur placoj kaj en parkoj kreis la etoson en la tuta urbo. Por siaj gastoj Moskvo malfermis la pordojn de siaj teatroj, stadionoj, instruejoj, entreprenoj kaj agrikulturaj kooperatioj. Kiel ĉiu delegacio ankaŭ la nia havis sian nacian festivalklubejon, kie okazis multnombraj amikecrenkontiĝoj inter la LGJ[1])-anoj kaj membroj de alinaciaj delegacioj. Same niaj delegitoj vizitis aliajn klubojn, tiel ke LGJ partoprenis pli ol 80 renkontiĝojn.

Komunan kontrakton pri amikeco kaj kunlaboro inter siaj organizoj subskribis E. Aurich, la Unua Sekretario de LGJ kaj Carlos Carrian Cruz, ĝenerala kunordiganto de la Sandinista Junularo de la 19a de julio de Nikaragvo, kiu ankaŭ voĉlegis la mesaĝon al la monda junularo pri la batalo por paco kaj prevento de nuklea katastrofo dum la solena fermo de la festivalo.

Nur eron de la programo mi povis partopreni — tamen mi travivis neforgeseblajn tagojn tie kiel delegito de nia Esperanto-Asocio kaj membro de nia centra delegacio de LGJ. Sian intereson kaj agadon por internacia komunikado kaj interkompreniĝo TEJO esprimis kiel partopreninta organizo dum diskuto pri tiu ĉi temo en la centro „Internacia Jaro de Junularo". Uzata lingvo estis ankaŭ Esperanto.

Dum deĵora tago en la TEJO-informstando en la Lomonosov-Universitato mi ne nur unufoje aŭdis la opinion, ke Esperanto ja estus bona solvo de lingvaj problemoj ĝuste dum tiaj amasaranĝoj.

TEJO-n reprezentis en Moskvo: Maria Vančurova (ĈS), Elisabeth Schwarzer (FRG), Graham Cansdale (GB), Laszlo Szilvasi (H), Roland Schnell (Okc. B.) kaj Steljana Dimitrova (BG). Estis por mi eksterordinara travivaĵo renkontiĝi dum la monda junulara festivalo kun pli ol 60 esperantistoj el 8 landoj. Inter la 13 000 turistoj, kiuj per „Intourist" vizitis la festivalon, estis ankaŭ 30kapa grupo de hungaraj esperantistoj. La moskvaj geamikoj kaj iliaj samlandanoj el Armenio kaj Sibirio (Krasnojarsk) afable gastigis nin en sia „Domo de internacia amikeco", kie mi kune kun aliaj reprezentantoj transdonis amikajn salutojn de la junaj esperantistoj de GDR. Armenia ĥoro kun la

(resto sur paĝo 136)

TEJO 1986 en Israelo??

Publika letero al la prezidantoj de UEA kaj TEJO

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), la Junulara Sekcio de UEA, decidis okazigi sian 42an kongreson 1986 en Neurim/Israelo. Tiun ĉi decidon akceptis la Estraro dum la 39a Kongreso de TEJO en Debrecen.
Ekde tiu-ĉi dato la decido estas akre diskutata. Plurfoje reprezentantoj el socialismaj landoj esprimis malkontenton pro tiu decido. Dum la 18a Konsultiĝo de 10 Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj oni esprimis fortan maltrankviliĝon pro tiu kongresplano. La prezidantoj (resp. vicprezidantoj) de Bulgara Esperanto-Asocio, Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, Hungara Esperanto-Asocio, Kuba Esperanto-Asocio kaj Slovaka Esperanto-Asocio en plena zorgo pro la reputacio de TEJO kaj UEA skribis leteron al la prezidantoj de tiuj organizoj. Ĝis fino de oktobro 1985 la menciitoj ne ricevis respondon. Malgraŭ diversaj interparoloj venis neniu respondo. Tio estas nekomprenebla sinteno de la Estraroj de TEJO kaj UEA al siaj aliĝintaj asocioj, kiuj ja meritas respondon al tiom gravaj leteroj. Intertempe la faktoj bedaŭrinde konfirmis la gravecon de la maltrankvileco. Nur necesas memorigi pri la bombatako de israelaj aviadiloj kontraŭ la PLO-sidejo en Tunizo.
Pro la malesto de ĉiu-ajn respondo, ni publikigas la menciitan leteron:

Pisanica, 19. 4. 1985

Al la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio
S-ro Grégoire Maertens
Al la prezidanto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
S-ro Ian Jackson

Estimataj s-roj Maertens kaj Jackson!

Ni, la subskribintaj landaj asocioj, diskutinte pri la decido de TEJO okazigi la Internacian Jundaran Kongreson en Israelo, esprimas nian plenan malkontenton pri la nesufiĉe pripensita elekto de la kongresa lando. Ni volas esprimi nian fortan konvinkon, ke la okazigo de la kongreso en tiu lando forte malutilos al la reputacio de UEA kaj ĝia Junulara Sekcio, TEJO. Ni volas motivigi nian sintenon per jenaj argumentoj:

1. En multaj landoj la homoj konsideras Israelon militanta ŝtato en la araba regiono, kiu aparte persekutas palestinan popolon kaj vivas en malpaco kun siaj najbaraj landoj.
2. UEA jam unufoje devis sperti, kiom danĝere estas okazigi Esperanto-kongreson en Israelo, en la jaro 1967, kiam Israelo atakis arabajn landojn. La danĝero de eksplodo de milito en tiu regiono daŭre estas aktuala.

Pro la supraj faktoj niaj landoj asocioj, respektive junularaj sekcioj, ne sendos siajn gejunulojn al Israelo.
Ni petas Vin rekonsideri la decidon de TEJO por ne malfaciligi la ĝisnunan bonan kunlaboron.

Plenestime

Por Bulgara Esperanto-Asocio	Hr. Gorov, prezidanto
Por Ĉeha Espreanto-Asocio	D-ro J. Jermař, prezidanto
Por Esperanto-Asocio en KL de GDR	H. Heinel, prezidanto
Por Hungara Esperanto-Asocio	D-ro I. Pethes, vicprezidanto
Por Kuba Esperanto-Asocio	A. Pinera, vicprezidanto
Por Slovaka Esperanto-Asocio	M. Zvara, vicprezidanto

La 10a Ĝenerala Konferenco de MEM

Dum la tagoj de la 70a Universala Kongreso de Esperanto, sed sendepende de ĝi, en Aŭgsburg okazis la 10a Ĝenerala Konferenco de MEM. La konferenco akceptis rezolucion (vidu p. 212) kaj novan agadprogramon. La konferenco elektis la Internacian Komitaton, kiu konsistas el 97 membroj el 32 ŝtatoj. Oni aljuĝis Honorinsignon de MEM al 25 elstaraj pacagantoj. serketariato de MEM ŝanĝiĝis kaj nun havas jenan konsiston: prezidanto: d-ro Imre Pethes (Hungario); honora prezidanto: Nikola Aleksiev (Bulgario); vicprezidantoj: William Gilbert (Francio), Claude Glady (Belgio), Magomet Isaev (USSR); ĝenerala sekretario: Clément Tholet (Belgio); sekretarioj: Nanba Syozi (Japanio), Vasja Cvetkova (Bulgario), ĉefredaktoro de „Paco": Violin Oljanov (Bulgario); centra administranto: Metodi Garev (Bulgario); centra kasisto: Pierre Jouvin (Francio).
La konferencon aktive partoprenis Hans Heinel, Hanna Scheffs kaj Detlev Blanke, kiuj raportis pri la MEM-agado en GDR kaj faris diversajn proponojn.

(resto de p. 135)

naŭjaraĝa steluleto Tigran prezentis sian programon, kaj ni spektis filmon, sinkronizitan en Esperanton, pri la venko super la faŝismo. Post tiu unua interkona renkontiĝo sekvis ankoraŭ aliaj pli kaj malpli grandaj sur la stratoj de Moskvo kaj en la loĝejoj de niaj novaj moskvaj geamikoj.

[1]) LGJ = Libera Germana Junularo. La socialisma junulara organizaĵo en GDR

La gazetaro pri ni: 1984

1. Centraj gazetoj

1.1.

— **Der Morgen,** LDPD, aliaj artikoloj ekster la serio:
13. 1. 84 lerneja E-rondo en Wriezen (foto), 15. 2. 84 poŝtstampo okaze de IFER '84, 21./22. 4. 84 pli longa intervjuo kun Uwe Siebert pri E-aktivecoj, 26. 7. 84 pri renkontiĝo de E-grupo en Eisenhüttenstadt k varbado, 28./29. 7. 84 infanoj el Wriezen-feriumo internacia en Budapeŝto, 3. 8. 84 69a UK en Vancouver, 11. 8. 84 distrikta renkontiĝo en Berlin

= 7

1.2. Fakrevuoj k organoj de fakorganizaĵoj

— **Der Stenopraktiker,** 8./1984, p. 214/215, dupaĝa teksto en k pri E por ekzerci maŝinskribadon
— **Fremdsprachenunterricht,** 2-3/1984, informo pri la 5a interlingvistika seminario 1984 en Ahrenshoop
— **GO-mitteilungen,** 2/1984, p. 1, pri E-istaj GO-anoj

= 3

1.3. Aliaj centraj gazetoj k revuoj

— **Neues Deutschland,** SED, 28. 3. 84 pri 17a Konsultiĝo de la E-asocioj de socialismaj landoj en Bad Saarow, 30. 6. 84 pri nova artefarita lingvo Adli, 25. 7. 84 pri internacia E-kurso en Bulgario;
— **Junge Welt,** FDJ, 28. 3. 84 pri 17a Konsultiĝo, 1. 10. 84 IVa Centra renkontiĝo en Dresden;
— **Mitteilungsblatt,** Kulturbund, 2/84 informo pri IFER '84, E-prospekto Buchenwald, internacia E-seminario ĉe Krossinsee, 4/84 17a Konsultiĝo;
— **Sonntag,** Kulturbund, n-ro 3/84 Buchenwald-prospekto, 2. 12. 84 IVa Centra renkontiĝo;
— **Tribüne,** FDGB, 11. 1. 84 Buchenwald-prospekto, 7. 2. 84 E-grupo en Wriezen (foto), amplekse pri laborista E-movado k tradicioj, 26. 7. 84 internacia E-somera lernejo en Bulgario

= 15

2. Distriktaj gazetoj

2.1. Berlin

— **Nationalzeitung** Berlin, NDPD, 17. 1. 84 E-klubo en lernejo de Wriezen, 11 .4. 84 17a Konsultiĝo;
— **Berliner Zeitung** (BZ), 28. 3. 84 17a Konsultiĝo, 25. 7. 84 Internacia E-somera lernejo en Bulgario, 9. 8. 84 artikoleto pri E-tendaro por junulaj specialistoj en Strausberg, 18./19. 8. 84 anonco i. a. por E-kurso en Popola Altlernejo, Berlin, 17./18. Nov. 84 invito al informvespero pri E;
— **BZ am Abend,** 8. 8. 84 pri E-aranĝo por junulaj specialistoj;
— **Humboldt-Universität,** SED, 22. 11. 84 artikolo pri la 6a interlingvistika seminario

= 9

2.2. Cottbus

— **Lausitzer Rundschau,** SED, Cottbus, 25. 2. 1984 intervjuo kun E-isto E. Proske (Guben), 22. 8. 84 artikoleto de Christel Kraus pri vivstacioj, 5. 9. 84/26. 9. 84 varbo por E-kursoj, 9. 10. 84 C. Kraus partoprenis internacian E-kurson en Pisanica;

= 5

2.3. Dresden

— **Sächsische Zeitung,** SED, Dresden, 31. 3. 84 E-agado en la distrikto (Zittau), 4. 2. 84 informo pri distrikta agado, 19. 6. 84 partneraj rilatoj Dresden-Ostrava, 8. 8. 84 IVa Centra renkontiĝo (Zittau), 15. 9. 84 informo pri sekvonta IVa Centra renkontiĝo, 1. 10. 84 pri pasinta IVa Centra renkontiĝo, 9. 11. 84 fondiĝo de altlerneja grupo, 28. 11. 84 artikolo pri E-agado k tradicioj (Meissen), 1./2. 12. 84 renkontiĝo de LEA-anoj (Zittau);
— **Sächsische Neueste Nachrichten,** NDPD, Dresden, 27. 1. 84 pacagado de dresdenaj E-istoj, 29. 9. 84 pri IVa Centra renkontiĝo;
— **Die Union,** CDU, Dresden, 23. 1. 84 pri agado de distrikta E-movado, 22. 2. 84 liturgio en E, 8./9. 9. 84 informo pri IVa Centra renkontiĝo;
— **Sächsisches Tageblatt,** Dresden, 2. 3. 84 informo pri E-agado en Dresden, 3. 10. 84 ampleksa artikolo pri la IVa Renkontiĝo k E-movado;
— **Dresdener Stadtrundschau,** Heimatzeitung, 27. 9. 84 trionpaĝa informo pri la IVa Centra Renkontiĝo;

= 17

2.4. Erfurt

— **Das Volk,** SED, Erfurt, 14. 2. 84 pri E, 18. 3. 84 Samarkand-kontakto kun Gotha, 23. 3. 84 E-kurso 17a Konsultiĝo, 18. 4. 84 intensa kurso, 10. 7. 84 honorigo de E-istoj, 13. 12. 84 junulara renkontiĝo en Eisenach;
— **Thüringer Landeszeitung,** LDPD, Erfurt, 10. 1. 84 E-agado en Gotha, 1. 2. 84, Buchenwaldprospekto (Gotha), 8. 2. 84 Buchenwaldprospekto (Weimar), 18. 2. 84 sondiskoj kun E-kantoj (Gotha), 24. 2. 84 E-konduko tra kaverno (Gotha), 26. 2. 84 prospekto en E (Gotha), 8. 3. 84 E-klubo en Samarkand petas pro impresoj pri Sovetunio (Weimar), 15. 3. 84 E-intensa kurso (Gotha), 23. 5. 84 artikoleto: junuloj vizitas laboristan E-veteranon (Gotha), 24. 5. 84 E en krucvortenigmo (Gotha), 5. 7. 84 honorigo de E-istoj, 10. 7. 84 artikoleto pri E-eldono de „for la batalilojl", 18. 8. 84 pupteatro kun E-nomo el Japanio (Gotha), 1. 9. 84 ampleksa intervjuo kun reĝisoro de japana pupteatro, 18. 10. 84 amika renkontiĝo, 3. 11. 84 pri unua junulara E-renkontiĝo (Gotha), 11. 12. 84 E en Tambach-Dietharz (Gotha);
— **Thüringer Tageblatt,** CDU, Weimar, 7. 1. 1984 dialogoj de Levsen, 2. 3. 84 liturgio en E, 29. 9. 84 varbo por E, 17. 11. 84 dialogoj de Levsen;
— **Thüringer Neueste Nachrichten,** NDPD, Erfurt, 26. 3. 84 pri aktivado en Gera, 28. 3. 1984 17a Konsultiĝo, 29. 9. 84 E-varbo;
— **Der Gummiwerker,** Waltershausen, 13. 12. 1984 artikolo pri renkontiĝo de iamaj LEA-anoj en Tambach-Dietharz (foto);
— **Der Fahrzeugbau,** Waltershausen, 10. 4. 84 pri E-kontaktoj kun bulgara artisto, 30. 11. 1984 internaciaj kontaktoj per E

= 37

2.5. Frankfurt/Oder

— **Neuer Tag,** SED, Frankfurt/O 27. 1. 84 opinio pri E kiel komprenilo (Eisenhüttenstadt), 11. 2. 84 infanoj el Wriezen partoprenas internacian desegnan konkurson (Wriezen), 6. 3. 84 varbo por E-kurso (Strausberg), 10. 3. 84 E-renkontiĝo okaze de Bach-naskiĝtago (Seelow), 12. 7. 84 E-agado en subdistrikto (Franfurt), 19. 7. 84 ferioj en E-ujo (Frankfurt), 26. 7. 84 distrikta agado, 5. 9. 84 E-kantoj dum renkontiĝo de veteranaj ĥoroj, 15. 9. 84 internaciaj travivajoj per E (Eisenhüttenstadt);
— **Kulturspiegel,** Eisenhüttenstadt, 3/84 informo pri E;
— **Junger Erbauer,** PCK Schwedt, 8. 2. 84 renkontiĝo k agado de E-istoj en distrikto, 25. 2. 84 amplekse pri E;

= 12

2.6. Gera

— **Volkswacht,** SED, Gera 2. 3. 84 informo pri la 8a kunsido de Centra Estraro, 30. 3. 84 E-istoj el Gera en Pardubice (Jena), 18. 5. 1984 agado en distrikto, 28. 9. 84 pli, longe pri E-agado en distrikto;
— **Thüringer Neueste Nachrichten,** NDPD, Gera 26. 3. 84 pri agado de E-istoj kun varbo por kursoj, 29. 3. 84 E-istoj el Jena en Pardubice (Jena);
— **Thüringer Landeszeitung,** LDPD, Jena 27. 3. 84 E-istoj el Jena partoprenis pacrenkontiĝon en Pardubice (Jena), 14. 4. 84 pri agado de E-istoj el la distrikto kun varbo por kurso, 2. 5. 84 ĝenerale pri E k varbo por kurso

= 9

2.7. Halle

— **Freiheit,** SED, Halle 28. 1. 84 varbo por E-kurso, 1. 2. 84 Buchenwald-prospekto, 26. 6. 84 informo pri renkontiĝo de E-amikoj (Sangerhausen), 26. 7. 84 nova kurso, 6. 11. 84 pri E-agado en Halle, amplekse;
— **Liberaldemokratische Zeitung,** LDPD, Halle 27. 1. 84 E-kursoj;
— **Der Neue Weg,** CDU, Halle, 7. 1. 84 dialogoj de Levsen, 31. 1. 84 E-kurso, 4. 2. 84 La Malnova Testamento en E, 21. 4. 84, 14. 7. 84 dialogoj de Levsen, 14. 7. 84 E en ekspozicio de poŝtmarkoj, 25. 8. 84 E en teatro;

= 13

2.8. Karl-Marx-Stadt

— **Freie Presse,** SED, Karl-Marx-Stadt 3. 3. 84 artikolo pri E-agado en subdistrikto (Auerbach), 10. 5. 84 anonco pri E-renkontiĝo en Johanngeorgenstadt (Johanngeorgenstadt), 19. 5. 84 informo pri E-renkontiĝo (Johanngeorgenstadt), 31. 5. 84 E-agado (Auerbach), 28. 6. 84 amplekse pri distrikta renkontiĝo (Auerbach), 29. 6. 84 honorigo de meritaj E-istoj (Ellefeld), 11. 7. 84 informo pri E-movado en distrikto (Auerbach), 26. 7. 84 perletera kontakto kun E-istoj en Nikaragvo (Werdau), 6. 9. 84 invito al informvespero pri E (Schwarzenberg), 3. 10. 84 pri E-informvespero (Johanngeorgenstadt), 6. 12. 84 7a renkontiĝo de E-veteranoj en Tambach-Dietharz, 28. Dez. 84 amplekse pri E-agado en subdistrikto (Schwarzenberg);

= 12

2.9. Leipzig

— **Leipziger Volkszeitung,** SED, 28./29. 4. 84 pri ekspozicio de fakgrupoj, i. a. pri E, 17. 5. 84 informo pri ekspozicio, sama, 12. 10. 84 E-salutoj el Sovetunio (Roßwein);
— **Der Schmiedewerker,** Roßwein, 3/84 pri E-korespondado, 6/84 letero el Leningrad;

= 5

2.10. Magdeburg

— **Volksstimme,** SED, Magdeburg, 22. 2. 84 amplekse pri E, 17. 10. 84 pri E-kurso en Pisanica;
— — — — — —
— **Madeburger Zeitung,** 26. 1. 84 E-istoj batalas por paco, 11. 10. 84 gastoj el Ŝumen en Magdeburg;
— **Liberaldemokratische Zeitung,** LDPD, 12. 10. 1984 bulgaraj E-istoj en Magdeburg, 20. 12. 84 Zamenhof-vespero;

= 6

2.11. Neubrandenburg

— **Freie Erde,** SED, Neubrandenburg, 4. 1. 84 E-agado (Templin), 20. 1. 84, 28. 1. 84 varbo por E-kurso (Neubrandenburg), 2. 2. 84 varbo por semajnfina kurso (Neubrandenburg), 18. 2. 84 klubvespero, anonco (Neubrandenburg), 21. 2. 84 informo pri klubvespero (Neubrandenburg), 2. 3. 84 pri sukcesplena bilanco de Neubrandenburgaj kursoj (Neubrandenburg), 6. 3. 84 E-aranĝo (Templin), 28. 3. 84 17a Konsultiĝo, 11. 4. 84 pacrenkontiĝo en Pardubice, 12. 5. 84 prezentado de Carola Lehr (foto) kiel popola korespondantino, 12. 5. 84 E-renkontiĝo de nordaj distriktoj, 28. 8. 84 SEFT-raporto, 5. 9. 84 junaj E-istoj en hungara pionirtendaro (Prenzlau), 22. 9. 84 varbo por E k E-kurso, 5. 12. 84 varbo;
— **Norddeutsche Neueste Nachrichten,** NDPD, Neubrandenburg, 9. 3. 84 E-kurso (Neubrandenburg), 11. 5. 84 amplekse pri la E-konferenco de la nordaj distriktoj;
— **Elan,** Neubrandenburg, 17. 9. 84 pri prelego pri E;
— **Antriebsrad,** Neubrandenburg, 15. 2. 84 E-kurso;
— **Postrakete,** Neubrandenburg, okt. 84 E-konferenco en Dresden;
— **Landbau heute,** Neubrandenburg, 3/84 invito al E-kurso

= 22

2.12. Potsdam

— **Brandenburgische Neueste Nachrichten,** NDPD, Potsdam, 19. 5. 84 E-istoj en Ruse;
— **DEFA-Blende,** Potsdam, 15/84 varbo por E-kurso;

= 2

2.13. Rostock

— **Ostseezeitung,** SED, (Stralsund) 31. 1. 84 raporto pri Hirošima-Nagasaki-libro, 23. 2. 1984 kolektado de poŝtkartoj per E — pli efektive, 17. 5. 84 saluto de E-renkontiĝo de nordaj distriktoj, 23. 6. 84 varbo por E-kurso, 24. 8. 84 pli longa varbo por E-intensa kurso, 14. 9. 84 pri E-tendaroj en Strausberg k Hungario, 22. 11. 84 varbo por E, 27. 11. 84 pri E-agado en subdistriktoj, 30. 11. 84 honorigo de E-isto per vojaĝo al Sovetunio, 30. 11. 84 salutoj el Lychen, seminaro por ekspertoj, 29. 12. 84 letero de E-istoj pri vojaĝo al Sovetio;

— **Ostseezeitung,** SED (Rostock), 10. 3. 84 Buchenwald-prospekto (foto), 17. 4. 84 prokrasto de E-prelego, 25. 7. 84 E-varbo (Wismar), 6. 12. 84 dato por E-festo;
— **Norddeutsche Neueste Nachrichten,** NDPD, Rostock 6. 1. 84 E-istoj en nova domo de KL (Stralsund), 22. 2. 84 kolektado de poŝtkartoj per E — pli efektive (Stralsund), 28. 3. 84 17a Konsultiĝo (Rostock), 17. 4. 84 prokrasto de prelego (Rostock), 3. 5. 84 E-isto honorigita (Stralsund), 26. 7. 84 internacia E-lernejo en Bulgario (Stralsund), 24. 8. 84 varbo por E-intensakurso 23. 11. 84 varbo por poŝtkartkolektado per E, 27. 11. 84 E-agado en subdistrikto, 30. 11. 84 honorigo de H. J. Borgwärdt (Stralsund), 5. 12. 1984 datŝanĝo de E-festo (Rostock);
— **Demokrat,** CDU, Rostock, 22. 2. 84 pk-kolektado per E — pli efektive, 17. 4. 84 prokrasto de E-prelego, 9. 5. 84 honorigitaj E-istoj, 25. 8. 84 varbo por E-intensa kurso, 22. 11. 84 pk-kolektado — pli efektiva;

= 31

2.14. Schwerin

— **Schweriner Volkszeitung,** SED, 28. 3. 84 17a Konsultiĝo, 31. 10. 84 informo pri distrikta renkontiĝo k nova kurso;
— **Der Demokrat,** CDU, Schwerin, 4. 2. 84 Malnova Testamento en E okupoj, ekspozicio, 22. 9. 84 dialogoj de Levsen, 17. 10. 1984 artikolo pri distrikta renkontiĝo kun eksterlandaj gastoj (foto)
— **Norddeutsche Zeitung,** LDPD, Schwerin, 31. 3. 84 junuloj en internacia E-tendaro, 15. 10. 85 amplekse pri distrikta renkontiĝo kun eksterlandaj gastoj, 10. 11. 84 E-seminario en Lychen;
— **Norddeutsche Neueste Nachrichten,** NDPD, Schwerin, 17. 10. 84 amplekse pri distrikta renkontiĝo kun internaciaj gastoj;

= 11

3. Resuma pritakso

1) La nombro de artikoloj pri E-agado (inkluzive la Levsen serio) bedaŭrinde iom regresis, sume 239 (1983 = 299). Eble tio ŝuldiĝas al neampleksa sendado de informoj al la Centra Estraro k ne al malpli gazetara aktivado aŭ eĉ malpli aktivado en distriktoj?
2) La diferenco inter la unuopaj distriktoj ne malpliiĝis. Laŭ mia opinio tio ne dependas de la nombro de la E-grupoj. Bv. kompari: Erfurt 37 (1983 51), Rostock 31 (28), Neubrandenburg 22 (21), Dresden 17 (14), Halle 13 (17), Frankfurt 12 (17), Karl-Marx-Stadt 12 (16), Schwerin 11 (19), Gera 9 (5), Berlin 9 (3), Magdeburg 6 (4), Cottbus 5 (16), Leipzig 5 (6), Potsdam 2 (21), Suhl 0 (6). Ses distriktoj plimultigis siajn publikigaĵojn en la gazetaro, la plej granda parto male.
3) Erfurt, Rostock k Neubrandenburg evidente plej bone rilatas al siaj distriktaj resp. subdistriktaj redakcioj. Eble tie ankaŭ troviĝas la plej viglaj korespondantoj. Kiel en 1983 relative stabila grupo de skribantoj sendis artikolojn al la redakcioj.
4) La publikigo de E-informoj en formo de serioj montriĝas efektiva, kiel ekzemple far Levsen en Der Morgeń.
5) La enhavo de plej multo de artikoloj estas dediĉita al aktivado de GDR-a e-istaro, ofte ligite kun varbo por E-kurso. Certe la gazetaro plej ŝatas tiajn kontribuojn.
6) Restas la tendenco publikigi samajn E-aranĝojn en kiel eble plej multaj gazetoj de la distrikto. Pripensinde estas, ĉu oni povas modifi laŭstile la enhavon?
7) La publikigo en uzinaj k entreprenaj gazetoj restis stabila nur en Erfurt, Neubrandenburg, Frankfurt, Leipzig k Potsdam konkeris novan terenon. Kial ne pli multaj uzis tion?

Mallongigoj
k =
kaj
SED =
Germana mallongigo por Socialisma Unuiĝinta Partio
CDU =
Kristan-Demokratia Unio de Germanio;
LDPD =
Liberaldemokratia Partio de Germanio;
NDPD =
Nacidemokratia Partio de Germanio;
FDJ =
Libera Germana Junularo;
FDGB =
Libera Germana Sindikata Ligo;
IFER =
Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo;
LEA =
Laborista Esperanto Asocio (ĝis 1933);
SEFT =
Somera Esperantista Familia Tendaro;
KL =
Kulturligo

Ingrid Schödl

La Levsen-serio en „Der Morgen" 1984

La regule aperanta artikola serio de Peter Levsen en la taggazeto „Der Morgen" (La Mateno), centra organo de la Liberala-Demokratio Partio de Germanio en GDR, fariĝis kvazaŭ memstara aldona informmaterialo, aldone al „der esperantist", kiu estas bonege utiligebla por la informagado de GDREA, por grupoj, kursgvidantoj kaj unuopuloj. Kiam ni skribis tiujn ĉi liniojn jam estas aperinta la 600-a kontribuo en tiu serio, kiu estis fondita de Paul Lindner en la jaro 1965. La membroj de GDREA kaj ĉiuj interesitoj pri Esperanto nepre abonu la menciitan taggazeton por ne malhavi aktualan (pli aktualan ol „der esperantist", kompreneble) informofonton kiu aperas ĉiun duan vendredon. Jen sekvas la artikoloj publikigitaj 1984. Ili bone montras la larĝan spektron de la traktitaj temoj.

555, 6. 1. 84: Esperanto-aranĝoj 1984 (de GDREA)
556, 19. 1. 84: Kvindek vortoj laŭ skemo (pri la tabelaj vortoj de Eo)
557, 10. 2. 84: La arto formi vortojn (pri la vortfarado de Eo)
558, 24. 2. 84: La vortelementoj (pri vortfarado de Eo)
559, 9. 3. 84: Prefiksoj kaj sufiksoj laŭ sistemo (pri vortfarado de Eo)
560, 23. 3. 84: Pluaj sufiksoj
561, 14. 4. 84: 17-a Konsultiĝo de Esperanto-organizaĵoj de soc. landoj
562, 27. 4. 84: Prononco laŭ modelo?
563, 11. 5. 84: Evito de malpermeso (pri „Völkerspiegel" 1924 en Leipzig)
564, 25. 5. 84: Projektoj de planlingvo
565, 22. 6. 84: Interkompreniĝo per simboloj (pri pazigrafioj)

Jubilea aranĝo de HEA

La 26an kaj 27an de oktobro 1985 en Budapest Hungara Esperanto-Asocio festis la 30an datrevenon de ĝia fondiĝo. GDREA estis reprezentita per la membro de sia Centra Estraro kaj prezidanto de la Distrikta Estraro Schwerin, Kurt Güse.

ISEU 1986

Bulgara Esperantista Asocio — Veliko Târnovo — organizis tradicie „Kvaran Internacian Someran Esperanto-Universitaton" ekde la 20a de julio ĝis la 25a de julio 1986 ĉe la loka Universitato „Kiril kaj Metodij".
Celo: plialtigo de la ĝenerala kulturo kaj lingva nivelo de la esperantistoj. Prelegos bulgaraj kaj alilandaj lektoroj pri diversaj popular-sciencaj temoj, pri interlingvistiko kaj esperantologio.
Limdatoj: 30. 4. 1986 kaj 31. 5. 1986.
Kotizo por eksterlandanoj:
80 levoj ĝis la 30a de aprilo 1986
90 levoj ĝis la 31a de majo 1986
Por gejunuloj ĝis 30 jaroj:
70 levoj âis la 30a de aprilo 1986
80 levoj ĝis la 31a de majo 1986
Petu aliĝilojn laŭ la adreso:
5000 Veliko Târnovo, Bulgara
Esperantista Asocio, P. K. 266, Bulgario

KIK '85

Konstanta Internacia Kvalifikejo de socialismaj landoj en Pisanica/Bulgario dum 1985—9—1/11
Partoprenis 26 geesperantistoj el BG, ĈS, GDR (la subskribintoj), H, Rom kaj SU, al kiuj tre plaĉis la kondiĉoj kaj la atmosfero de la Internacia Esperanto-kursejo Pisanica. Ni povas tute konfirmi, ke ĉirkaŭ la agrabla hotelo situas pitoreska pejzaĝo invitanta al promenado aŭ ekskursado en la Rodopa montaro.
KIK celas transdoni spertojn de movadgvidantoj de socialismaj landoj al kadruloj de la movado por plivigligi kaj aktivigi la Esperanto-movadon entute. KIK estis gvidata de Tibor Vasko (sekretario de HEA). Eminentaj parolantoj estis i. a. d-ro Imre Péthes, Nikola Aleksiev (prezidinto kaj honora prezidanto de MEM) kaj Kunĉo Valev (BEA-estrarano pri instruado).
La prelegoj temis pri ideologio, historio, kulturo kaj organizado de la Esperanto-movado, pri Zamenhof, la pacmovado kaj MEM, pri informado kaj argumentado, interlingvistiko, pedagogio, metodiko, faka aplikado kaj kvalifikado de kadroj. La altnivelaj kaj informriĉaj prelegoj konatigis nin pri la plej aktualaj problemoj kaj taskoj de movada aktiveco.
Tamen kritikan rimarkon ni ŝatus aldoni: La landaj Esperanto-asocioj devas pli zorge elekti flue parolantojn, ĉar la partopreno de komencantoj estas vana monelspezo kaj malaltigas la ĝeneralan lingvan nivelon.
Ni krome dezirus, ke la kursoj estu pli viglaj kaj stimulu la diskutadon.
Fine ni esprimas nian dankon el BEA, kaj al la ĉeforganizanto, Donĉo Hitrov, pro la bonega prizorgado.

Rosen Trenner / Bert Schumann

Fervojaj jubileoj 1985

Dum la jaro 1985 la germanaj fervojoj festis sian 150jaran ekzistadon. La fervojo en GDR jam 40 jarojn estas popolpropra. Amplekse oni raportis pri tiuj jubileoj, kion ni ĉi-tie ne volas fari. En la ombro de tiuj grandaj okazoj, sed intime ligita kun la medio, estas la fervojista esperantista fakgrupo de GDR, kiu povas retrorigardi al 8jara ekzistado. Ĉi-loke pro tio estu permesata malgranda rerigardo kaj informo.

La 23an de majo 1977 la tiama Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR donis sian aprobon por la fondo. La fondkunveno okazis la 26an de novembro 1977 en Berlin (Orienta stacidomo). Post la necesaj preparoj la praktika agado de la malmultaj fakgrupanoj komenciĝis lige al la IIIa Centra Renkontiĝo de Esperantistoj de GDR dum oktobro 1978. Ekde 1979 ni eldonas la informilon „Fervojistaj Novojoj" (FN) redaktata de Horst Jasmann. En n-ro 1 ni prezentis nian fakgrupon kaj menciis la taskojn de FN. Samjare aperis n-ro 2. Ĝis nun aperis 21 numeroj. En n-ro 1/1983 ni denove kaj komplekse prezentis niajn taskojn kun alvoko je kunlaboro por ellabori kronikon (FN n-ro 20), Oni povus resumi la sukcesojn jene:

— Daŭre kaj regule aparadas „Fervojistaj Novajoj".
— FN estas sendata al 15 organizajoj en la eksterlando.
— Ĉiujare okazas jaraj renkontiĝoj, ĉiam kun eksterlandaj partoprenantoj.
— La fakgrupanoj regule partoprenas aranĝojn de esperantistaj fervojistaj organizaĵoj en la socialisma eksterlando.
— Eksterlandaj kolegoj, partoprenintaj niajn jarajn renkontiĝojn raportas en la Esperanto-gazetaro en- kaj eksterlande.
— La fakgrupanoj ellaboras fakprelegojn por prezento en naciaj kaj eksterlandaj aranĝoj.
— La fakgrupanoj kunlaboras en la terminologia komisiono de IFEF (Internacia Fervojista Esperantista Federacio) por traduko de la leksikono de la Internacia Fervojista Asocio (UIC-leksikono).
— Oni eldonas termino-listojn pri la fervojafera leksiko en Esperanto.

Horst Theurich

Unua litova libro en Esperanto

La Litova Filio de ASE informas, ke fine de 1986 en Litovio aperos la unua belarta E-libro post la dua mondmilito. La respublika eldonejo „Vaga" (Sulko) en la ĉefurbo Vilnius aperigos unuecan verskolekton (aŭ poemon) sub la komuna titolo „Homo" de la fama litova poeto Eduardas Mieželaitis, bone konata en la tuta Sovetio kaj ankaŭ eksterlande. Tiu-ĉi verskolekto aperis en 7 naciaj lingvoj de Sovetio kaj en kelkaj eksterlandaj. Al Esperanto la versaron tradukis P. Celiauskas. Du verkoj en Esperanto el tiu ciklo aperis en „Horizonto de Soveta Litovio" („Brakoj" en kvara kajero 1979, „Okuloj" en kvina kajero 1980). La libro enhavos ilustrajojn de la fama litova grafikisto Stasys Krasaukas. Ĝi estos bele tipografie presita en la plej bona presejo de Litovio. En la eldonplano de la eldonejo „Vaga" por 1986 la libro havas la numeron 117. Planata eldonkvanto — 4 000 ekz., sed ĝin eblas pligrandigi- se estos multaj antaŭmendoj.

Prof. Peevski — 80jara

La meritplena bulgara internacie rekonata sciencisto kaj esperantisto, prof. d-ro h. c. Vasil Peevski, fariĝis 80jara la 7an de septembro 1985. Li i. a. estis prezidantc de la Internacia Federacio de geodezistoj. Dum Universalaj Kongresoj prof. Peevski prezentis kelkajn prelegojn kadre de la Internacia Kongresa Universitato. Aparte grava estas lia rolo kiel ĉefredaktoro de la „Scienca Mondo", la esperantlingva varianto de la organo de la Monda Federacio de Sciencaj Laboruloj. Prof. Peevski kelkfoje vizitis GDR, i. a. kiel gasto de la 10a Kongreso de Kulturligo 1982 en Dresden.
Al la jubileulo la Centra Estraro de GDREA deziras ĉion bonan por la estonteco.

Honorinsigno de GDREA por Tibor Vaskó

La sekretario de HEA kaj ĉefo de la Centra Oficejo de HEA estis distingita per la Honorinsigno de GDREA la 26an de oktobro 1985 pro elstara kontribuo al la pliprofundigo de la amikeco kaj kunlaboro inter HEA kaj GDREA. La distingon transdonis Kurt Güse dum la jubilea aranĝo de HEA en Budapest.

Artikolo pri tradicioj de Rostock

La distrikta estraro de Kulturligo Rostock eldonis 1985 broŝuron sub la titolo „Beiträge zur Geschichte des Kulturbundes in Mecklenburg und im Bezirk Rostock" (Kontribuoj pri la historio de Kulturligo en Mecklenburg kaj en la distrikto Rostock). Redaktis ĝin Luise Langendorf. En tiu 96paĝa broŝuro ni trovas sur paĝoj 68 — 73 tre faktoriĉan artikolon de Werner Plate, prezidanto de la Distrikta Estraro de GDREA Rostock, sub la titolo „Traditionen und heutige Aufgaben der Esperantisten" (Tradicioj kaj nuntempaj taskoj de la esperantistoj).

Vizito en Pollando

De la 5a ĝis 14a de julio 1985 12 junaj esperantistoj el la distrikto Karl-Marx-Stadt kaj 2 knabinoj el Prenzlau partoprenis Esperantotendaron por ~elernantoj en Koszalin. Kurson gvidis Woldemar Nowakowski.
La restado estis riĉimpresa. Ni vizitis la urbojn Slupsk, Kolobrzeg kaj Mielno, konkursis en Esperanto kaj havis multajn kontaktojn kun polaj amikoj.
Apartan dankon pro la agrablaj tagoj meritas magistro W. Nowakowski, liaj filinoj Anita kaj Isa kaj ĉiuj aliaj polaj amikoj.

Ch. Papenmeier

Rostoka jubileo

La 19an de oktobro 1985 pli ol 30 esperantistoj el Rostock kaj aliaj lokoj kaj gastoj el Pollando kaj ČSSR festis la 20an datrevenon de la fondo de la Esperanto-grupo en Rostock, kiu ĝis hodiaŭ estas gvidata de Paul Köster. La aranĝon partoprenis d-ro Detlev Blanke, kiu siatempe aktive partoprenis la refondon de la Esperanto-movado en Rostock kaj ties distrikto.

Konferenco pri Esperanto-propagando

De la 28-a ĝis la 31-a de marto 1986 en urbo Vraca (Bulgario) okazos INTERNACIA KONFERENCO PRI ESPERANTO-PROPAGANDO kun ekspozicio de esperantaĵoj.
Eblas persona aŭ koresponda partopreno.
Kiu deziras partopreni persone, devas sendi al la menciita adreso sian nomon, naskiĝdaton, naskiĝlokon, profesion, adreson, landon (en Esperanto) kaj la temon de sia prelego, kaj li/ŝi ricevos invitilon. La organizantoj informos ilin pri la kostoj.
La dezirantoj partopreni koresponde devos sendi la tekstojn de siaj prelegoj ĝis la 25-a de februaro 1986 al la sama adreso.
Ĝis la 20-a de marto 1986 oni akceptos esperantaĵojn por la ekspozicio.
Ĉiuj partoprenantoj post la konferenco ricevos libron kun la prelegoj.
La programo de la konferenco inkluzivos ekskursojn al la ĉefurbo Sofio, urbo Orjahovo kaj insulo „Esperanto".
En la semajno post la konferenco okazos kursoj de Esperanto, kaj de la 4-a ĝis la 8-a de aprilo — Internacia scienca seminario, dediĉita al la 25-jara jubileo de lanĉo de Jurij Gagarin kun prelegoj en Esperanto kaj riĉa ekskursa programo.
KORESPONDADRESO:
Esperanto, p. k. 66, 3000 Vraca, BULGARIO

5a pionira tendaro

De la 29a de julio ĝis la 3a de aŭgusto 1985 ĉe Strausberg okazis la 5a renkontiĝo de esperantistaj pioniroj sub la gvido de Fritz Wollenberg. La organo de la pionirasocio „La tamburo" (Die Trommel) en sia numero 35/85 publikigis ampleksan artikolon.

Denove IREBIK

La jam tradicia internacia renkontiĝo de esperantistoj ĉe Berlin sur la kampadejo Intercamping ĉe Krossinsee okazis de 1a ĝis 14a de septembro 1985. Partoprenis du bulgaraj grupoj kaj esperantistoj el Hungario kaj GDR, entute 50 personoj.

Plakate erhältlich

Der Zentralvorstand des Esperanto-Verbandes bietet Werbeplakate für Esperanto an. Format 41 x 58 cm, blaue Farbgebung. Geeignet für Eindrucke. Preis 0,50 M pro Exemplar.

DDR-Ausgabe des „Paco" 1985 erschienen

Das 40seitige, illustrierte Heft enthält wieder zahlreiche Beiträge zur Problematik des internationalen Friedenskampfes, literarische Materialien anläßlich des 40. Jahrestages der Befreiung, Artikel über die UNO und die UNESCO, über Johann Sebastian Bach sowie Fachartikel über Zamenhof und über Fragen der internationalen Terminologie-Normung.
Abonnenten des „Paco" in der DDR erhalten die Nummer auf Anforderung kostenlos.

„El la hungara poezio"

Jus aperis lukse prizorgita albumo, konsistanta el du grandaj stereofonaj diskoj, en la eldono de HUNGARTON. 44 poemoj de 24 hungaraj poetoj en la plenumo de 11 hungaraj geaktoroj (el la 44 tradukoj 30 venas el la plumo de Kalocsay). Ĉiuj poemoj estas ĉerpitaj el Hungara Antologio, do, posedantoj de tiu unika volumo havos la duoblan plezuron percepti la perlojn de la hungara poezio samtempe per okuloj kaj oreloj.

KORESPONDDEZIROJ

Ni publikigos nur tajpitajn koresponddezirojn!

Pollando

14j. lernantino, komencantino, dez. kor., kol. pm, bk: Aleksandra Belžek, ul. Dworcowa 12, **87-300 Brodnica.**

Gelernantoj de mezlernejo dez. kor. kun gejunuloj tutmonde: Esperanto-Klubo „Verda Amikeco", mgr. inĝ. Ubik Boguslaw, ul. Michalowicza 2/22, **43-323 Czechowice-Dziedzice.**

Stanislaw Luźniak, Oŝ 700-lecia 1 m 26, **63-600 Kepno,** 42j., dez. kor. kol. pm, bk, librojn.

Lernantino de la 7a klaso dez. kor. pri muziko, kol. bk, pm, librojn: Renata Helman, **63-400 Ostrów Wlkp.,** ul. PPR 44/11, woj. Kalishie.

Katarzyna Hentschke, ul. Raszhowska 54/2, **63-400 Ostrów Wlkp.,** woj. Kalishie, (7a klaso), dez. kor. pri muziko, kol. pm bk.

Krzysztof Markiewicz, ul. Navvojowska 5/6, **33-300 Nowy Sacz,** (15j.) dez. kor., kol. pm, bk

Barbara Ziolkowska, ul. Kaliny 95/41, **41-506 Covzów-B,** (14j.), dez. kor. pri moderna muziko, sporto, kol. bk, pm

Oficisto, 40j., dez. kor. tutmonde, kol. pm: Bolesław Weremko, ul. Czereŝniowa 12 m 8, **21-040 Swidnik k/Lublina**

Studento, 25j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Wiesław Kot, ul. 22j. junulino dez. kor. tutmonde pri turismo, vojaĝoj, kol. sonbendoj kun junulara muziko: Barbara Włodarczyk, **24-200 Bełzyce,** ul. Ogrodowa 8

Turisma Esperanto-Klubo ligos kontaktojn kun grupoj okupiĝantaj pri turismo: Turisma Esperanto-Klubo, **26-604 Radom,** ul. Makowska 8 m. 1

23j. junulino dez. kor. kun germanoj p. ĉ. t., kol. bk: Teresa Jagiela, **96-100 Skierniewice,** ul. Mszczonowska 25 m. 42

14j. lernantino dez. kor. tutmonde pri literaturo, kol. bk, pm.: Magdalena Wroclawska, Grabonóg 62/1, **63-820 Piaski** z

Irena Lecka, **26-600 Radom,** ul. Zawadzkiego 2 m 87, dez. kor. pri turismo, vojaĝoj.

Dez. kor. p. ĉ. t.:

— Katarzyna Kulawiak, os. Powstańców sl. 12E/3, **44-240 Żory,** (19j.)
— Elzbieta Niedopytalka, ul. Kaszubska 11/41, **44-335 Jastrzebie Zdroj** (39j.)
— **Jan Slowinski,** ul. Marusarzówny 12/16, **44-335 Jastrzebie Zdroj,** 34j.
— Miroslaw Kwietniewski, ul. Turystyczna 8/20, **44-335 Jastrzebie Zdroj,** (30j.)

Stefano Merta, ul. Polanki 40 m 2, **80-308 Gdansk-Oliwa,** (15j.), dez. kor. kun samaĝuloj p. ĉ. t., kol. pm, bk.

Wojciech Grochowski, **01-184 Warszawa,** ul. Wawelberga 3 m 195, (27j.) dez. kor. kun junaj esp. pri sporto, turismo, muziko

35j. fraŭlino dez. kor. tutmonde pri lingvoj, komputeroj, edukado: Zofia Majewska, ul. Sieradzka 40, **98-220 Zduńska Wola**

Soveta Unio

Ivar Heio, Kehra, **Kingissepa 3-20,** Estonio, 13j., dez. kor., kol. pm, bk

Andrej Faktovec, **197101 Leningrad,** ul. Krovotkina 9.5, kv. 10, 21j., dez. kor., kol. bk pri bestoj

17j. lernanto dez. kor. tutmonde pri historia belarta literaturo, mondpaca movado, lingvoj, Esperanto: Vladislav Semennikov, Joludev-str., **Volgograd-6**

Komencantino 21j. dez. kor. p. ĉ. t., kol. bk: Eglé Žilinshaitei, Pušinio 50-39, **234520 Kapsukas,** Litovio

Sperta esperantisto dez. kor. kun tutmonda intelektularo pri tradukarto, problemoj de literatura evoluo kaj verkado, interŝ. tradukojn k. originalajn verkojn k. t. p.: Aleksandr Fjodorov, **335028 Sevastopolj-28,** ab. k. 59

22j. studento-radioteknikisto dez. kor. tutmonde p. ĉ. t. kun gejunuloj pri vojaĝoj, kol. esperantajojn: Aleksandro Ŝĉerbakov, **690 039 Vladivostok,** av. 100-let Vladivostoku 103, E-klubo

24j. laboristo-komputisto-programisto dez. kor. ekonomio, kibernetiko kun gesam. el Japanio, Kanado, Usono, Aŭstralio, kol. librojn, bk: Vadim Sokolov, **690 035 Vladivostok,** ev. 100-let Vladivostoku 103, E-klubo

Maria k Valdo Banaitis,**232 031 Nova Vilnia,** Pergales 26-35, 43j., kuracistoj, dez. kor. kun kolegoj el orienteŭropo, Ĉinio, pri psikiatrio, alkoholismo, poezio.

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16